



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Septembro 2016 n-ro: 9



Merhaba !

Eylül ayında gene sizlerle. Yaz neredeyse bitmek üzere ama Eylül ayı da yazın sonundaki en güzel zamandır.

Temmuz ayı sonunda Esperanto dünyasının en önemli olaylarından birisi olan 101. Uluslararası Kongre Slovakya Nitra kentinde gerçekleştirildi. Ne yazık ki bu Kongreye Türkiye'den sadece üç kişi katılabildik. Diğer iki kişi ülkedeki olaylardan olayı izin alamayıp Kongre'ye katılmadı.

Bu sayıda size bir çok yazı dışında kongreden de bilgi aktarmaya çalıştık.

Videolar ve resimlerle çok detaylı bir Kongre anlatısını ise Milliyet gazetesinin blogunda aşağıdaki bağlantıda bulabilirsiniz:

<http://blog.milliyet.com.tr/bir-kongrenin-ardindan/Blog/?BlogNo=539032>

Hepinize iyi okumalar...

Saluton !

Ni denove estas kun vi en la monato de septembro. Somero preskaŭ finiĝas sed septembro eble enhavas la plej belan tempon en la fino de somero.

En la fino de julio okazis unu el la plej gravaj kunvenoj de Esperantujo, la 101a Universala Kongreso, en urbo Nitra en Slovakio. Bedaŭrinde, ke pro la lasta situacio en nia lando nur tri esperantistoj sukcesis partopreni la UK-on, kaj du ne povis ricevi permeson eliri la landon.

En ĉi tiu numero krom la multaj verkaĵoj, ni ankaŭ provis provizi vin kun infromoj el la Kongreso.

Pli detalan rakontadon de la Kongreso, kun multaj videoj kaj fotoj, vi povas trovi kaj legi en la jena ligilo de la Blogo en Milliyet ĵurnalo:

<http://blog.milliyet.com.tr/bir-kongrenin-ardindan/Blog/?BlogNo=539032>

Bonan legadon al ĉiuj !



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo


Saluton!	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
La 10-a Mezorianta Kunveno	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
Tejo	3
Pri lernado de Esperanto	4
Mikelo la sitelo	5
Birdo Fenikso	6
La 8-a Azia Kongresoo	8
Ĉu Esperanto estas lingvo facile lernebla?	9
Vakcino kontraŭ rabio	9
Malnovaj Grekaj Mitoj: SISIFO	10
Internacia Lingvo en la Oficiala Nemateria Kultura Heredaĵo listo de Pollando	12
Gramatiko - Participoj Ja Estas Simplaj!	13
Ŝercoj	14
Kruĉvort-enigmo	14
Kuiru kun mi	15
La Junaj Detektivoj (4)	16
50-a Kongreso de ILEI en Busan, Koreio (2017)	17
Nova poŝt-markon eldonis la Slovaka Poŝt-oficejo okaze de la 101-a UK	17
La 101-a UK en Nitra	18
Novaj Honoraj Membroj de UEA	19
"Pribina" la kongresa kuriero de la 101-a UK	19
La Nova Estraro de UEA elektita	20
UEA en Nitra Diplomis 14 Elstarajn Agantojn	20
Interveno de UEA ĉe UN en Ĝenevo	21
Esperanto Tago	21
Mallonga Historio de Filozofio (9)	22
El la libro de "Dao De Jing" (2)	23
Mortis Paul Gubbins - Portreto	24
Omaĝe al Paul Gubbins (poemo)	24
Poemoj de Evgenij Georgiev - Espopore	25
Poemoj de Konuralp	25
Esperanto Kurso (9)	26
La 102-a UK en Seulo (julio 22a-29a 2017)	27
Karavano al Seulo por la 102-a UK	27
Kapanış	28

Kursoj



Nuntempe kursoj ne okazas pro la somerumado kaj feriadoj. Ni esperas ke ili komenciĝos denove dum oktobro.

La 10-a Mezorianta Esperanto-Kunveno



10-a Mezorianta Esperanto-Kunveno kaj 1-a Kaŭkaza Esperanto-Kunveno

Renkontiĝo de esperantistoj el kaŭkazaj kaj mezorientaj landoj en Kartvelujo en la jaro 2017.

Datoj: de la 31-a ĝis la 3-a de aprilo 2017, kun postaj ekskursoj dum la semajno, unu el kiuj en Armenujo.

Programo: prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj!

Aliĝoj kaj informoj ĉe:

mezorianta.kunveno@esperanto.org

aŭ ĉe

http://uea.org/vikio/La_deka_Mezorienta_Kunveno_en_Kartvelujo



Ni atendas leterojn de geamikojn

Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!




Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



En Nitra la 101-a UK okazis kunsido pri Esperanto-Sumoo kiun gvidis japana Esperantisto Hori Jasuo.

Oni parolis pri kiel disvatigi la Esperanto-Sumoon por kreskigi la nombron de partoprenantoj.



Plue okazis kunsido de la "Societo por parkere kanti la himnon Espero" denove gvidita de Hori Jasuo. Bedaŭrinde

ke ĉi foje nur unu partoprenanto sukcesis gajni diplomon.



En la kunsido okazis Bingo ludo, kaj oni multe kantis la himnon "La Espero".

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Jen la diplomo de la Julia Sumoo



UEA



N-ro 621 (2016-07-15)
La danĝera lingvo en nova eldono
Unu el la plej famaj verkoj pri la

Esperanto-historio, La danĝera lingvo de Ulrich Lins, aperis ĉe UEA en nova, reviziita eldono ĝustatempe por prezento en la 101-a UK en Nitro. Ĝi estos havebla ankaŭ en la SAT-kongreso en Herzberg kaj mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

En la reta katalogo:
<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9318>

N-ro 623 (2016-07-21)

Alvoko por komuna informkampanjo pri Esperanto

La pasintmonataj okazaĵoj montris, ke la nuna tempo tre taŭgas por informi pri Esperanto, ĉar homoj multe pli ol antaŭe interesiĝas pri lingvaj demandoj, ĉefe en la landoj de Eŭropa Unio, sed ne nur.

La skizo de la plano de UEA kaj TEJO estas helpi la informadan agadon pri Esperanto kunordigante kaj proponante rimedojn bezonatajn por tion efike fari. Por la kunordigado ni serĉas ĉefkunordiganton, kunordiganton de tradukantoj, kiel eble multajn tradukantojn, grafikumantojn, disvastigantojn, homojn, kiuj ŝatus kunlabori por tiu celo.

Skribu al briteliro@co.uea.org (laŭeble ĝis la 15-a de aŭgusto 2016) indikante pri kia supra rolo vi interesiĝas, kaj vi estos invitata al laborgrupo por kunlabori por laŭeble plej taŭga utiligo de la situacio por plibonigi la konatecon kaj prestiĝon de Esperanto.

TEJO



Kontakto estas revuo por tiuj, kiuj interesiĝas pri aliaj landoj,

popoloj, kulturoj kaj socioj. Kontakto-n legas esperantistoj el ĉ. 100 landoj, ankaŭ kunlaborantoj venas tra la tuta mondo. Speciale por komencantoj parto de tekstoj aperas en la lingvoj „facila“ kaj „tre facila“. Kontakto estas unu el la plej bele ilustritaj E-revuoj. Ĝin eldonas kunlabore TEJO kaj UEA, kun 6 numeroj jare. Individuaj membroj kaj patronoj de TEJO ricevas Kontakto-n aŭtomate. Aliaj povas aboni ĝin pere de UEA-kotizperanto aŭ rekte ĉe UEA (prezoj varias depende de la lando). Eblas ankaŭ kolektivaj abonoj (ekde 6 ekzempleroj) kun rabato de 40%!

Jen retpaĝo de Kontakto:
<http://kontakto.tejo.org/>

Por fariĝi membro de TEJO, oni membriĝu en Universala Esperanto-Asocio (UEA), ĉar TEJO estas ties integra parto. Vi estas en la aĝo por esti membro de TEJO, se vi aĝas malpli ol 30 jarojn (aŭ 30-jariĝas ne pli frue ol en la jaro por kiu vi membriĝas) (por ke ni sciu tion, ne forgesu indiki vian naskiĝdaton). Ankaŭ atentu, ke la kategorio MG (Membro kun Gvidlibro) ne validas por membriĝi al TEJO. En la ttpaĝaro de UEA vi trovos la retan aliĝilon.



Pri lernado de Esperanto



Laŭdire la fama rusa verkisto Lev Tolstoj lernis Esperanton tiel rapide, ke li jam la unuan tagon scipovis paroli en tiu lingvo. Sed kie estas la pruvo? Kaj kiom li scipovis?

Kiam mi estis instruisto pri la germana (dum multaj jaroj), kelkfoje iu lernanto aŭ lernantino demandis en la unua lernohoro, kiam li aŭ ŝi parolos la germanan. Mi ĉiam respondis: “Hodiaŭ”. Kaj mi ekplikis, ke la gelernantoj parolos la instruitan lingvon iomete (t.e. kelkajn frazojn) en la unua lernohoro.

Evidente la demandantoj volis ekscii, kiam ili parolos flue. Do mi diris, ke tio dependas de pluraj faktoroj, i.a. de la tempo kaj energio investitaj en la lernadon (t.e. kiom da diversspecaj ekzercoj oni faras for de la lernejo) kaj de la talento de la gelernantoj por lerni lingvojn (ĉar sendube la homoj havas malsamajn talentojn: por muziko, matematiko, naturaj sciencoj, lingvoj ktp.).

Tion mi diris en kurso de la germana. Nun mi povas aldoni, ke la rapideco de la lernado dependas evidente ankaŭ de la koncerna lingvo, kaj ni ĉiuj scias, ke Esperanto estas internacie la plej facile lernebla lingvo. Mi diris “internacie”, t.e. por la homaro ĝenerale, sed ne nepre la plej facila fremda lingvo el ĉiuj, ĉar eblas, ke du lingvoj de la sama lingvofamilio estas tiel similaj, ke la parolantoj de unu lernas tre facile kaj rapide la alian. Tamen tio estas speciala kazo, kaj ni rajtas diri, ke Esperanto estas – pro siaj konataj karakterizaĵoj – la plej facila lingvo.

Mi menciis la verkiston Tolstoj, sed oni scias pri aliaj homoj – ofte junaj – kiuj lernis la internacian lingvon ege rapide, povante komunikiĝi (pli-malpli flue) post unu jaro, aŭ kelkaj monatoj aŭ eĉ semajnoj. Kiel eblas? Kial ne ĉiuj lernantoj sukcesas scipovi Esperanton tiel rapide? Miaopinie la faktoroj estas: 1) talento por lingvoj; 2) bona memorkapacito; 3) forta deziro scipovi ĝin; 4) la instrumentado; 5) laŭeble ĉiutaga farado de diversspecaj ekzercoj; 6) okazoj praktiki la lingvon.

Rilate talenton, ni devas distingi la kapaciton paroli de la scipovo skribi. Estas homoj, kiuj scipovas legi, kompreni la parolatan lingvon kaj eĉ skribi unu aŭ plurajn fremdlingvojn, sed havas malfacilecon paroli ilin. Verŝajne ili havas tiun malfacilecon en sia propra gepatra lingvo. Fakte multaj homoj estas



rezerviĝemaj, ne ŝatante paroli multe. Aliaj – aŭ la samaj – ĉiam observas dum la parolado, ĉu ili parolas korekte, kaj tio igas la paroladon malpli flua.

Bone, tio koncernas la paroladon. Tamen dua grava faktoro, kion mi menciis supre – bona memoro –, estas bezonata ne nur por parolado, sed ankaŭ por la aliaj lingvaj kompetentecoj, ĉefe por skribi.

Kiam ni legas aŭ aŭdas, la kunteksto multe helpas kompreni la tekston. Krome la homoj, kies gepatra lingvo estas latindevena (kaj aliaj, kiuj jam lernis tian lingvon), havas la avantaĝon, ke multaj esperantaj vortoj estas similaj al vortoj, kiujn tiuj homoj konas en aliaj lingvoj.

Sed kiam oni volas paroli aŭ skribi, la afero estas tute malsama. Kvankam la esperanta gramatiko estas multe pli simpla ol tiu de aliaj lingvoj, oni bezonas memori ne nur la – kompare malmultajn – regulojn (kaj apliki ilin), sed precipe multajn vortojn. Do necesas bona memoro – kaj praktikado, tiel ke la vortoj repetiĝas kaj povas esti memorataj.

Tamen la proksimeco inter la vortoj de Esperanto kaj tiuj de la latindevenaj lingvoj kaŭzas alian problemon, kiam oni produktas (buŝe aŭ skribe) iun tekston: oni imagas, ke iu vorto, kiun oni volas uzi kaj kiun oni konas en la gepatra lingvo (aŭ alia latindevena lingvo, kiun oni scipovas) estas la sama aŭ tre simila en Esperanto, kaj tio ofte kaŭzas erarojn.

Kion fari? – Praktiki, praktiki, praktiki, skribante kaj parolante. Kaj por plibonigi la tiel nomatajn “pasivajn” lingvajn kompetentecojn necesas multe legi kaj aŭskulti.

Por fini ĉi tiun artikolon, mi rakontas mian propran sperton:

Mi eklernis Esperanton antaŭ 15 jaroj, pro du kialoj:

ĉar mia edzino lernis ĝin, kaj ĉar mi – instruisto de lingvoj – volis koni tiun artefaritan lingvon. Sed mi lernis – memstare – nur la bazajn regulojn kaj legis kelkfoje kelkajn tekstojn. Vere mi ne interesiĝis pri Esperanto – aŭ mi ne havis tempon interesiĝi pli. Do mi ne aŭskultis nek skribis nek parolis.

Mi komencis interesiĝi, kiam mi akceptis – fine de 2013 – la proponon de mia edzino partopreni en la Universala Kongreso de 2014 en Bonaero. Tiam mi komencis aŭskulti esperantajn tekstojn (mi malkovris la retejon Esperanta Retradio komence de 2014) kaj mi skribis miajn unuajn etajn tekstojn (mallongajn retmesaĝojn). Iomete post la UK mi komencis kunlabori en la Esperanta Retradio. Sed mi daŭre ne parolis Esperanton, ĉu pro manko de oportuno, ĉu pro

mia naturo, sufiĉe rezerviĝema. Aliflanke, por kompreni kaj por skribi, helpas min mia kono de aliaj eŭropaj lingvoj. Tamen, kiel mi diris, necesas praktiki, praktiki, praktiki. Mia ĉiusemajna artikolo estas speco de praktikado. Krome, estante ankoraŭ lernanto de Esperanto, mi sonregistras la aliajn ERR-artikolojn en portebla sonregistrilo kaj aŭskultas ilin dum mia preskaŭ ĉiutaga piedirado.

Tiun ĉi artikolon kaj ankaŭ ĝian sonartikolon verkis kaj produktis Herbert A. Welker el Brazilo. Vi povas aŭskulti la sonartikolon el la jena ligilo.

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.com/2016/04/pri-lernado-de-esperanto.html>

Legajo - Mikelo la sitelo

Facila



"Mikelo la sitelo" de Kuzhali Manickavel

Mikelo estis la plej malfeliĉa sitelo en la mondo.

Iam ĉiuj en la ĝardeno ŝatis lin.

La ĝardenisto svingis lin per lia forta tenilo, kiam li iris por preni akvon. "Kia bonega sitelo," li diris.



Sed post iom da tempo, Mikelo la sitelo ekhavis truon.

Subite li fariĝis senutila. Kial havi sitelon kun truoj?

Mikelo estis ĵetita en angulon de la ĝardeno. Oni lasis lin ekstere en la pluvo, sub la suno kaj li komencis rustiĝi. Foje iuj eĉ piedfrapis lin. "Mi devas meti tiun sitelon en la rubujon," grumblis la ĝardenisto. Mikelo ne volis esti en rubujo. Li sentis sin tre malgaja kvankam liaj bonaj geamikoj en la ĝardeno provis konsoli lin. La sciuroj restarigis lin, kiam li falis flanken, kaj la birdoj bonhumore ĉirkaŭflugis lin. "Ne zorgu, Mikelo!" ili pepis trankvilige.

Mikelo vere provis esti feliĉa, sed estis ege, ege malfacila.

Unu tagon, knabineto kuris tra la ĝardeno kaj haltis antaŭ Mikelo. Li suspiris kaj pensis, ke ree li estos piedfrapita, sed subite li aŭdis: "Perfekte!"

Iom poste li sentis ŝprucon de la ĝardena akvotubo. La knabino purigis lin! Li sentis, ke pezaj pecoj de rusto forfalas kaj lia humoro multe pliboniĝis.

"Ho! Vi jam havas grandan truon ĉe la subo!" diris la knabino, kiam ŝi enrigardis. "Ankoraŭ pli bone!" Mikelo ne povis kredi tion, kion li ĵus aŭdis. Ŝi deziris havi sitelon kun truoj?

La knabino prenis lin kaj metis lin en la verandon, plenigis lin kun riĉa tero kaj plantis etan rozon en ĝin. "Ĝi estas beba rozo," ŝi diris al Mikelo. Vi devas helpi min zorgi pri ĝi, ĉu bone?"



Mikelo estis tiom feliĉa. La knabino vere ŝatis lin! Ŝi eĉ petis, ke li zorgu pri tiu eta rozo. Mikelo preskaŭ eksplodis pri ĝojo. Li staris rekte kaj fiere dum la knabino finplatis.

Ŝi atenteme metis Mikelon en la plej bonan lokon de la verando. Temis pri komforta angulo, protektita de la vento kaj pluvo. Mikelo okulsignis kaj ridetis al siaj geamikoj en la ĝardeno.

"Rigardu mi zorgas pri tiu eta rozo!"

"Ni ĝojas pro via nova tasko, Mikelo!" diris la sciuroj,

kaj la birdoj gaje pepis.

Mikelo bonege zorgis pri la rozo kaj ricevis vizitojn de la knabino kaj de siaj geamikoj ĉiun tagon.

Li nun fariĝis la plej feliĉa sitelo en la mondo.

Prenita de Bookbox
<https://youtu.be/O0kccFdBsHA>

Vortareto		ĵus	hemen şimdi	rideti	gülümsemek
		komforta	konforlu	rubujo	çöp kutusu
akvotubo	su hortumu	konsoli	teselli etmek	rustiĝi	paslanmak
angulo	köşe	kredi	inanmak	rusto	pas
angulo	köşe	kvankam	rağmen	ŝati	beğenmek
ankoraŭ	hala, henüz, daha da	okulsigni	gözle işaret etmek	sciuro	sincap
atenteme	dikkatli şekilde	peco	parça	senti	hissetmek
bonhumore	iyi niyetli şekilde	pepi	cıvıldamak	senutila	işe yaramaz
ĉirkaŭflugi	etrafında uçmak	perfekte	mükemmel şekilde	sitelo	kova
deziri	arzu etmek	peti	rica etmek	ŝpruco	püskürme
ege	çok fazla	peza	ağır	subite	aniden
ekhavi	sahip olmak	piedfrapi	ayakla vurmak,	subo	alt kısım
eksplodi	patlamak		tekmelemek	suspiri	iç çekmek
enrigardi	içine bakmak	plenigi	doldurmak	svingi	sallamak
fariĝi	olmak	pliboniĝi	iyileşmek	tasko	görev
fiere	gururlu şekilde	pluvo	yağmur	temi	hakkında olmak
finplati	çiçek ekmeği bitirmek	preskaŭ	hemen hemen	tenilo	kol, tutamak
flanken	yana doğru	protektita	korunmuş	trankvilige	sakinleştirici şekilde
forfali	uzağa düşmek	purigi	temizlemek	truo	delik
forta	güçlü	ree	yeniden, tekrar	vento	rüzgar
grumbli	homurdanmak	rekte	doğru/dik şekilde	verando	teras, veranda
halti	durmak	restarigi	tekrar ayağa	vizito	ziyaret
humoro	ruh hali		kaldırmak	zorgi	endişe etmek,
ĵetita	atılmış	ricevi	almak		bakmak, ilgilenmek

Birdo Fenikso

malfacila



En la ĝardeno de la paradizo, sub la arbo de la sciado, staris rozarbetaĵo; ĉi tie, en la unua rozo, naskiĝis birdo, kiu per sia flugado povis konkuri kun la lumo kaj kies koloroj estis admirindaj, kies kantado estis belega.

Sed kiam Eva deŝiris la frukton de la sciado, kiam ŝi kaj Adam estis elpelitaj el la ĝardeno Eden, tiam de la flamanta glavo de la kerubo falis fajrero en la neston de la birdo kaj ekbruligis ĝin. La birdo mortis en la flamo, sed el la ardanta ovo ekflugis nova, la sola, la ĉiam sola birdo fenikso. La legendo diras, ke tiu birdo havas sian neston en Arabujo kaj en ĉiu centa jaro mem sin forbruligas en sia nesto, kaj nova fenikso, la

sola en la mondo, elflugas el la ardanta ovo.

La birdo flugas ĉirkaŭ ni, rapida kiel la lumo, admirinda pro siaj koloroj, belega en sia kantado. Kiam la patrino sidas ĉe la lulilo de la infano, la birdo troviĝas apud la kapkuseno kaj frapas per siaj flugiloj, ĝis ĉirkaŭ la kapo de la infano formiĝas aŭreolo. Ĝi flugas tra la ĉambro de mizero, kaj tiam tie ekregas sunlumo, tiam la mizera komodo ricevas odoron de violoj.

Sed la birdo fenikso estas ne sole birdo de Arabujo, ĝi flugas ankaŭ en la brilo de la nordlumo super la glaciaj kampoj de Laplando, ĝi saltetas ankaŭ inter la flavaj floroj en la mallonga somero de Grenlando.

Inter la kuprahavaj rokoj de Fahlun kaj en la karbominejoj de Anglujo oni aŭdas la frapadon de ĝiaj flugiloj, kaj ĝi flugas super la preĝolibro en la manoj de la pia laboristo. Sur la folio de la lotuso ĝi pelas la sanktan akvon de la rivero Gango, kaj la okuloj de la Hinda knabino eklumas, kiam ŝi ĝin ekvidas.

Birdo fenikso! Ĝu vi ne konas ĝin, la paradizan birdon, la sanktan cignon de la kantado? Sur la ĉaro de Tespis ĝi sidis kiel babilema korvo kaj frapadis per la nigraj feĉogutantaj flugiloj. Super la harpo de la Islanda kantisto glitadis la ruĝa sonora beko de la birdo; sur la ŝultroj de Shakespeare ĝi sidis kiel korvo de Odin kaj flustradis al li en la orelon: senmorteco. Dum la festo de la kantistoj ĝi flugis tra la kavalira salono de Wartburg.

Birdo fenikso! Ĉu vi ĝin ne konas? Ĝi kantis al vi la Marseljezon, kaj vi kantis la plumon, kiu elfalis el ĝiaj flugiloj; ĝi venis en paradiza brilo, kaj vi eble deturnis

vin de ĝi kaj turnis vin al la pasero, kiu sidis kun oritaĵo sur la flugiloj.

Ho vi paradiza birdo, ĉiucentjare renovigata, en flamoj naskata kaj en flamoj mortanta, via bildo pendas en ora kadro en la salonoj de la riĉuloj, dum vi mem, ofte erarvaganta kaj sola, flugas tien kaj reen, nur legendo: birdo fenikso en Arabujo.

En la ĝardeno Eden, kie vi naskiĝis sub la arbo de sciado, en la unua rozo, tie Dio vin kisis kaj donis al vi la ĝustan nomon: poezio.

Aŭtoro: Hans Christian Andersen.

Tradukis: Zamenhof.

Voĉoj: Flávio Fonseca kaj Cristina Pancieri.

Muziko: Flávio Fonseca. Registrita en la jaro 2012.

Fonto:

<http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/birdo-fenikso/>

Vortareto		forbruligi	yakıp yok etmek	mizera	sefil
		Gango	Ganj nehri	mortanta	ölen
admirinda	hayrana değer	glacia	buzlu	naskiĝi	doğmak
arda	ateşli	glavo	kılıç	nesto	yuva
ardanta	yanan	gliti	kaymak	ora kadro	altın çerçeve
aŭreolo	hale	Grenlando	Grönland	oritaĵo	allı pullu
babilema	konuşkan	ĝusta	doğru	ovo	yumurta
beko	gaga	harpo	arp (müzik)	paradizo	cennet
brilo	parlaklık, aydınlık		enstrümanı)	pasero	serçe
ĉaro	tekerlekli (savaş)	kampo	tarla, alan	pia	dindar
	arabası	kapkuseno	yastık	plendi	şikayet etmek
cigno	kuğu	karbominejo	kömür madeni	plumo	kuş tüyü, dolma
ĉiucentjare	her yüzyılda	kavaliro	şövalye		kalem
deŝiri	kopartmak	kerubo	başmelek Kerubim	poezio	şiiir, nazım
deturnis	geri çevirmek	kies	ki onun	preĝolibro	dua kitabı
ekbruligi	yakmak	komodo	komodin	renovigata	yenilenmiş
elpeli	dışarı atılmak	konkuri	yarışmak	rozarbetaĵo	küçük gül ağacı
erarvaganta	yanlış yerde gezen	korvo	karga	salteti	ufak ufak zıplamak
Fahlun	İsveç kenti	kuprahava	içinde bakır olan	sciado	bilgi
fajrero	kıvılcım	Laplando	Lapland yarımadası	senmorteco	ölümsüzlük
feĉoguti	maya damlayan	legendo	efsane	sonora	ses çıkartan
fenikso	anka kuşu	lotuso	lotus çiçeği, nilüfer	ŝultro	omuz
flamanta	alev alev olan	lulilo	beşik	Tespis	tiyatronun yaratıcısı
flamo	alev	Marseljezo	fransız milli marşı		Yunan kadın sanatçı
flustri	fisıldamak	maskata	doğurulmuş		



Esperanto-Kantoj kaj muzikoj - MP3-elŝutado

Vinilkosmo produktas, eldonas kaj distribuas ekskluzive esperanto-bandojn kaj artistojn en ĉiuj eblaj aktualaj muzikstiloj, artistoj el la tuta mondo. <http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/>

La 8a Azia Kongreso - inter la 3-a kaj 6-a de novembro en Quanzhou

La 8a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Quanzhou, sudorienta Ĉinio, paralele kun la 5a ILEI-seminario en Orienta Azio (5a ISOA). Ankaŭ tie okazos la 10a Jarkunveno de IKEF-Ĉinio (komercistoj) enkadre de la kongreso.



La 8-a Azia Kongreso de Esperanto
Quanzhou 3-6, Nov, 2016

Kvar-taga Esperanto-festeno kun riĉa programo kaj multaj ekskursoj tra Quanzhou-urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kiu dum tiu sezono havas perfekte agrablan veteron.

TEMO: Esperanto por azia kunlaboro en la reta epoko!

Kongresejo: HUAQIAO Hotelo (Quanzhou Overseas Chinese Hotel)

Kongresurbo: Quanzhou situas en Fujian-provinco, suda Ĉinio.

Vetero: En novembro la loka vetero estas milda. Averaĝe la plej alta temperaturo estas 24 celsiaj gradoj, la plej malalta estas 16 gradoj. La meznombra pluvokvanto estas 18 milimetroj.

PROGRAMO (provizora)

La 3a, ĵaŭde,

Akceptado en la hotelo ĝis 20:00

14:00–17:00 Prelegoj

19:00–21:00 Interkona Vespero

La 4a, vendrede,

10:00–11:30 Inaŭguro

14:00–17:00 Kunvenoj

19:00–21:00 Nacia Vespero

La 5a, sabate,

09:00–12:00 Kunvenoj

14:00–17:00 Promenado tra Quanzhou

19:00–21:00 Internacia Vespero

La 6a, dimanĉe,

09:00–11:30 Vizito al urba muzeo de Quanzhou

14:30–15:30 Fermo

*Kelktaga postkongresa ekskurso estas planata.

KIEL ALIĜI ?

(al la 8a Azia Kongreso, ILEI-Seminario (5a ISOA) kaj la 10a Jarkunveno de IKEF-Ĉinio)

- Aliĝu al la kongreso kaj mendu hotelĉambron prefere sendante simplan retmesaĝon al la Loka Kongresa

Komitato. (Bv. plenigi ĉi-suban aliĝilon kaj sendi ĝin al retadreso: aziakongreso@163.com)

- Familio nomo:

- Persona nomo:

- Sekso:

- Lando:

- Poŝta adreso:

- Retpoŝta adreso:

- La aliĝkotizo estas pagita al

- Mi deziras la oficialan komunan foton de la kongreso: jes / ne

- Ĉu vi havas ion specialan por kontribui al la kongreso (ekz. Internacia Vespero)? (bv. komenti)

- Ĉu vi partoprenos postkongresan ekskurson? jes / ne

- Libera komento

ALIĜKOTIZO:

60 eŭroj por A-landoj;

30 eŭroj por B-landoj/kunulo/handikapulo/junulo malpli-ol-30jara.

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B;

B: lamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio, Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

*Se vi volas la oficialan komunan foton de la kongreso, bv. aldone pagu 8 eŭrojn.

LKK

Pri detalaj informoj (inkluzive de loĝado) havu kontakton kun LKK:

Retadreso: aziakongreso@163.com


Retejo: <http://www.esperantoazia.net/>

Poŝta adreso: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, PO Box 825, Beijing, CN-10003.

Telefono: +86 10 68321808; +86 10 68995937



Ĉu Esperanto estas lingvo facile lernebla ?



Ofte okazas, ke Esperanto-lernantoj komence taksas la lingvon ege facila, kaj post kelka tempo da lernado plendas, ke fakte ĝi estas ne tiel facila, kiel oni asertas en la propagandiloj. Ĉu ili pravas ?

Unue ni rimarkigu, ke facileco (aŭ malfacileco) estas nocio maleble taksebla objekte, ĉar ĝi estas tre diversa laŭ la homoj, la denaska lingvo, ktp... Antaŭ ol respondi al la demando, ni ne forgesu, ke Esperanto estas internacia lingvo, tio estas, ke ĝi devas esti facile alirebla ne nur al kelkaj sed al ĉiuj popoloj de nia planedo, konsekvence ĝi devas esti la malplej fremda el ĉiuj fremdaj lingvoj, alidirite la plej facila (aŭ almenaŭ la malplej malfacila). Tiucele nekontesteble Zamenhof enmetis en la lingvon nenian el la senutilaj malfacilaĵoj kaj komplikaĵoj abunde ĉeestantaj en la etnaj lingvoj. Li ĉiam elektis la plej logikajn kaj la plej simplajn solvojn tuj kompreneblajn de la plimulto de la homoj. Ni citu nur kelkajn ekzemplojn por ilustru tiun aserton : la fonetiko estas simpla (ĉiu litero prononciĝas ĉiam sammaniere), la akcento estas regula, la konjugacio de la verboj estas simpla, la radikoj estas sensanĝaj, la finaĵoj montras la naturon kaj la rolon de la vortoj en la frazo. Oni povus daŭrigi la liston... Malgraŭ tio la facileco ne povas esti absolute egala por ĉiuj esperantistoj. Ekzemple la esperantistoj, kies denaska lingvo ne enhavas la difinitan artikolon « la », trovas ties uzon iom malfacila, dum por aliaj la uzo de la refleksiva pronomo « si » estas ege malfacila.

Kiam oni lernas fremdan lingvon, oni « metu flanken » la apartaĵojn kaj mallogikaĵojn de la propra lingvo por enkapigi tiujn de la lernota lingvo. Oni eliru el komplikaĵoj konataj de longe por eniri en novajn komplikaĵojn . La peno estas duobla. Male lernante Esperanton, la ĉefa tasko estas la jena : eliri el la kutimoj kaj refleksoj akiritaj de la plej juna aĝo en la gepatra lingvo, por asimili novan « sistemon » multe pli simplan kaj logikan. Bedaŭrinde la natura emo de la homa menso estas tia, ke oni trovas malfacila tion, kio ne similas al nia denaska lingvo, eĉ se tio estas pli simpla kaj pli logika, do « teorie » pli facila. Preterlasi la apartaĵojn de la denaska lingvo postulas penon. Tial la plej oftaj eraroj de la Esperanto-lernantoj ŝuldiĝas ne al la malfacileco de Esperanto sed fakte al la malfacileco de niaj propraj lingvoj, kies apartaĵojn ni emas senatente enmeti en Esperanton. Jen miriga paradokso : la facileco de Esperanto estas ofte perceptata de la lernantoj kiel malfacileco.

Kiel eliri el tiu kontraŭdiro ? Ŝajnas al mi, ke la legado de libroj de bonaj verkistoj kun krajono enmane por noti dirmanierojn tipe esperantaj, estas bona ekzercado por penetri en la spiriton de la lingvo. Tiel iom post iom, oni kutimiĝas « lasi flanke » la refleksojn akiritajn en la propra lingvo kaj pensi rekte en Esperanto. Jes, Esperanto estas facila, tamen kiel ĉia ajn lernado, ĝi postulas minimumon da peno, kaj ni ne forgesu, ke la lernado de iu ajn lingvo neniam finiĝas, inkluzive de tiu de la denaska lingvo. Neniu homo povas firme aserti, ke li regas ĝin perfekte.

Sendis Paule Brunel (Francio)

La 6-an de julio 1885 Pasteŭro eltrovis vakcinon kontraŭ rabio

La 6-a de julio 1885 estis memorinda tago. Tiutage la franca sciencisto Pasteŭro (1822-1895) eltrovis la unuan porhoman vakcinon kontraŭ rabio.

Rabio estas mortiga infekta malsano. 99 procentoj da rabiuloj estis trafitaj per mordo kaj grato de infektitaj kortaj hundoj aŭ per ilia salivo.

Rabio okazas en diversaj lokoj de la mondo ekster la Antarkta Kontinento. Pli ol 95 procentoj da mortintaj rabiuloj vivis en Azio kaj Afriko.

Rabio ofte estis neglektita de malriĉaj kaj malfortaj homgrupoj, kiuj malfacile ricevis vakcinojn kaj imunoglobulinon. 5-14-jaruloj en izolitaj regionoj estis ĉefaj

suferantoj de tiu malsano.

La eltrovo de Pasteŭro savis sennombro da vivoj de rabiuloj kaj malfermis novan vojon por batali kontraŭ infektaj malsanoj per vakcinoj. Li inaŭguris la novan eraon en la civilizacia kaj sana historio de la homaro. Dum pli ol 100 jaroj post tiu eltrovo de Pasteŭro, kontraŭ-rabia vakcino estis senĉese plibonigita kaj perfektigita.



Redaktoro: Niu Xueqin

Fonto: http://www.espero.com.cn/2016-07/06/content_38822219.htm

En malnovaj tempoj la homoj timis la diojn. Kaj tiu, kiu ne timis la diojn, timis almenaŭ la morton. Sed la ruza reĝo Sisifo timis nek la diojn nek la morton.

Li fondis la riĉan urbon Korinto kaj konstruis la korintan burĝon. Sur la burĝo ne ekzistis fonto kaj Sisifo pripensis, kiel li povus instigi la diojn, por ke ili donacu fonton al la burĝo. Ĉe tio bonŝanca hazardo helpis lin.

La sorto, kiu regas homojn kaj diojn, kaŭzis, ke la rivera dio Asopo ekkverelis kun diopatro Zeŭso. Li serĉis Zeŭson, sed ne povis trovi ties kaŝejon. Sisifo aŭdis pri tio kaj eltrovis per ruzaĵo, kie vivas Zeŭso.

Tuj li rapidis al Asopo kaj diris: „Mi scias, en kiu angulo la diopatro kaŝiĝas. Kaj volonte mi diros tion al vi, se ankaŭ vi helpas min el embaraso. Mi konstruis burĝon, en kiu ne estas akvo. La servistoj devas alporti ĝin de malproksima puto. Helpu min, kaj mi helpas al vi.“

Asopo konsentis. Li venis en la burĝon kaj tuŝis rokon en la burĝa korto. Tuj fontis el la roko strio de klara frida akvo. Dankema por tiu servo Sisifo perfidis la kaŝejon de Zeŭso.

Plena de fervoro Asopo komencis persekuti Zeŭson. Li forgesis, ke Zeŭso estis la reganto de la dioj kaj de la homoj kaj havas la komandoforton pri la fulmo.

Plena de kolero observis Zeŭso la alproksimiĝon de Asopo. Li ĵetis sian fulmon al li, kaj Asopo komencis bruli. La brulvundita dio ĵetiĝis en la riveron kaj tiu kondukis de tiam karbopecetojn en sia fluo.

Kiam Zeŭso jam punis Asopon, lia kolero direktiĝis al Sisifo.

„Ekiru“, li ordonis al Morto, „forkonduku Sisifon en la regnon de la ombroj, tie li ne plu povos malkaŝi sekretojn.“

Kaj Morto ekiris.

Reĝo Sisifo staris sur remparo de sia burĝo kaj rigardis malsupren al la sunprilumata regiono. En la tagmeza ardo flaviĝis la herboj kaj je la lacigitaj arboj ne moviĝis eĉ folio. La regiono estis malplena de homoj. Ĉiuj ripozis en la ombro de siaj domoj. Nur la reĝo ne serĉis ombron. Li divenis, ke la puno de



Zeŭso proksimiĝas. Subite li vidis kiel Morto sur la polva strato paŝas al la burĝo.

Sisifo rapidis en la burĝon, prenis du fortajn ŝnuregojn kaj starigis sin al la pordo. Nenion divenante, Morto paŝis en la halon. Sisifo ĵetis ŝnuregon sur Morton kaj fermis la maŝon, kun la alia ŝnurego li katenis Morton kaj enfermis ĝin en kamero. Poste li elspiris faciligite. Nun Morto ne plu povas damaĝi al li.

Sisifo ne mortis. Kaj ankaŭ neniu alia en la mondo. Morto kuŝis katenita en la burĝo. Doloroj kaj epidemioj plu plagis la homojn kiel ĉiam, sed ili ne finiĝis.

La homoj fariĝis pli kaj pli oldaj kaj ne povis morti. Ankaŭ birdoj trafitaj de sago flugis plu, kaj la ĉasbestoj fuĝis kun la lanco en la dorso en la profundojn de la arbaro.

La brutoj maljuniĝis kaj neniu povis preni iliajn vivojn.

Kun morna vizaĝo Zeŭso vokis la militan dion Areso. „Sisifo metis kapo-suben la mondan ordon“, diris la diopatro, „kiu krom vi, militdio, povus liberigi Morton kaj sendi al la homoj?“

Dio Areso grimpis teren, disrompis la pordon de la kamero, en kiu Sisifo retenis Morton kiel kaptiton kaj liberigis sian amikon. Apenaŭ Morto liberis, li kaptis Sisifon kaj trenis lin en la submondon.

De tiam Morto denove vizitadis la loĝejon de la homoj, veturis kun la maristoj sur ties ŝipoj, akompanis la ĉasistojn en la arbarojn kaj la soldatojn en la militojn.

La ruza Sisifo sciis, ke Morto venkos, kaj tial li jam ĝustatempe antaŭpreparis sin.

Li ordonis al sia edzino, ke post lia morto ŝi ne oferu ion en la funebraj solenaĵoj.

En la submondo poste li plendis pri sia edzino.

„Ŝi forgesis min“, li diris, „ŝi ne okupiĝas pri la sanktaj ritoj.“

Ĉiuj en la ombra regno bedaŭris lin, kaj la regantino de tiu morna regiono, Persefono mem, permesis al li reiri al la vivantoj kaj memorigis la edzinon pri ŝia devo.

Sisifo revenis el la regno de la eterna tenebro en la tagan lumon kaj la hipokrita zorgo malaperis el lia vizaĝo. Ĝoje li rapidis al sia burgo.

Por festi sian revenon inter la homojn li aranĝis ĝojan festenon. Pri la reiro al la ombroj li ne pensis. Li laŭdis sian edzinon, ke ŝi plenumis lian sendian komision.

Jam odoris la festhalo laŭ rostitaj bovofermuraĵoj, kaj la pokalojn oni plenigis per dolĉa vino. La halo zumadis de la babilado kaj antaŭ la fajrejo sidis blinda kantisto kun sia liro. Sisifo levis la pokalon por festena tosto.

Sed la vino jam ne plu malsekigis liajn lipojn. Morto, kiu staris post li, ŝiris la pokalon de lia buŝo kaj kondukis lin je dua fojo en la mortulan regnon.

Kruele punis la dioj mortemulojn, kiuj ne respektas diojn kaj ties leĝojn.

Ankaŭ Sisifo ricevis malican punon. Li devas ruli en la submondo gigantan marmorblokon sur monteton, kaj se li finfine troviĝas supre, deglitas la ŝtono de li kaj ruliĝas denove malsupren.

Ĉiam denove Sisifo devas ripeti sian vanan laboron, ĉiam renovigas sin lia turmento, kiu neniam finiĝas.

**Tradukis Donjo & Cezar
laŭ la ĉeĥa originalo
„Staré řecké báje a pověsti“
de Eduard Petiška
Eldonejo ALBATROS en Prago
Korektis Vladimir Türk**

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/cezar/4618254>

Vortareto		epidemia	epidemi	kateni	ellerini bağlamak
		eterna	sonsuz	kaŭzi	sebepl olmak
alproksimiĝo	yaklaşma	fajrejo	ateş yeri	komandoforto	idafe etme gücü
antaŭprepari	önceden hazırlamak	fermtiri	çekerek kapatmak	komisio	komisyon, heyet
apenaŭ	hemen hiç / zorlukla	fervoro	coşku, azim	konduki	yol göstermek, görütme
ardo	sıcaklık	festena	bayrama dair		inşa etmek
Areso	savaş tanrısı Ares	festhalo	tören salonu	konstrui	Korent ŝehri
babilado	sohbet, karşılıklı konuşma	flaviĝi	sararmak	Korinto	avlu
blinda	kör	fluo	akış	korto	yorgunlaştırılmış
bovofermuraĵo	öküz butları	fondo	kurmak	lacigita	mızrak
brutoj	besi hayvanları	fonto	kaynak	lanco	övgü
burgo	ortaçağ kalesi	frida	soğuk, serin	laŭdi	lir (çalgı)
ĉasbesto	av hayvanı	fuĝi	kaçmak	liro	malproksima
dankema	müteşekkiri	fulmo	şimşek	malproksima	uzak, yakın olmayan
degliti	tekrar kaymak	funebra	cenazeye ait	malsekigi	ıslanmak
devo	görev	giganta	dev gibi	marmorbloko	mermer blok
diopatro	tanrıların babası	grimpi teren	yeryüzüne inmek (tırmanmak)	maŝo	kement
direktiĝi	yönlenmek	ĝustatempe	tam zamanında	meti kapo-suben	tersine çevirmek
disrompi	parçalamak	halo	salon	morna	yas tutmaya dair
diveni	tahmin etmek	hazardo	şansa oluşan şey	observi	gözlemlemek
dorso	sırt	hipokrita	iki yüzlü	odori	kokmak
ekkvireli	kavgaya başlamak	kameno	baca	okupiĝas	meşgul olmak
elspiri	nefes vermek	kaptito	esir	ombro	gölge
eltrovi	bulup çıkarmak	karbopeceto	kömür parçası	ordoni	emir vermek
embaraso	utanç	kaŝejo	gizlenme yeri	paŝi	adım atmak
enfermi	içeri kapatmak	kaŝiĝi	saklanmak	perfidu	ihanet etmek

Persefono	tanriĉa Demeter'in kızı	rito	ritüel	tenebro	karanlık yer onun
plagi	salgın	rostita	ızgara yapılmış	ties	korkmak
plendi	şikayet etmek	ruliĝi	yuvarlanmak	timi	şerefe kadeh
pokalo	iĉki kadehi	ruza	kurnaz	tosto	kaldırmak
polva	tozlu	ruzaĝo	kurnazlık		işkence
profundo	derinlik	sago	ok	turmento	dokunmak
puto	kuyu	sankta	kutsal	tuŝi	boşuna
rapidis	hızla gitmek	ŝiri	yırtmak	vana	gönüllü olarak
regiono	bölge	ŝnurego	kalıp ip, halat	volonte	Zeus
regno	krallık	solenaĝo	tören	Zeŭso	ilgi, bakım konuları
remparo	sur	sorto	kader	zorgo	arı gibi vızıltı
renovigi	yenilemek	strio	ŝerit	zumadi	çıkartmak
reteni	tutmak	subite	aniden		
ripeti	tekrarlamak	submondo	aŝaĝidunya		
		sunprilumata	güneşin aydınlattığı		

Internacia Lingvo en la Oficiala Nemateria Kultura Heredaĝo listo de Pollando

Pasintjare Pollando aldonis la Internacian Lingvon Esperanton en la oficiala Nemateria Kultura Heredaĝo Listo por protekti ĝian valoron.

Esperanto unue estis nomita "Internacia Lingvo" kaj ĝin kreis Ludoviko Zamenhof kiu naskigis en Bjalistoko Pollando (1859-1917). Li en la jaro 1887 eldonis manlibron pri la fundamento de la lingvo kaj subskribis ĝin per la pseŭdonimo "Doktoro Esperanto" kiu signifas "Doktoro kiu esperas". Tra tempo la vorto "Esperanto" fariĝis la nomo de la lingvo mem.

Ĉi tiu artefarita lingvo rapide komencis vivi sian propran vivon. Esperanto dum preskaŭ 130 jaroj evoluis kaj kreiĝis komunumo nomita Esperantujo, kiu estas bazita sur la ideoj de Zamenhof.

Fondita kaj ankoraŭ estas multaj organizoj kaj asocioj helpi teni en tuŝo kaj apogi la aktivecoj rilatigitaj kun la scienco kaj la antaŭenigo de Esperanto, kaj la ideo de la ĝenerala homa kompreno rilataj al tiu lingvo. Inter Esperanton evoluigis fortan identigon kaj grupo ligojn kiuj iras preter konscion pri nacia identeco aŭ etneco. Esto Esperanto egalas al konfesante certaj valoroj kaj kredoj.

Por solida tradicio de Esperanto inkluzivas jara Universala Kongreso de Esperanto, okazigita ĉiujare en malsama lando aŭ Arto Konferencoj "ARKONES" en Poznań. Esperanto tradicio por esti ankaŭ memoris la kreinto de lingvo, Esperanto antikvaj medioj kaj ilia kontribuo al la disvolviĝo de esperanta kulturo. Dum la kunvenoj praktikis Esperanton Esperanton kantante la nacia himno, fari paroladojn kaj rakontojn aŭ anekdotoj media memoroj. Ankaŭ Esperanto funerales

okazos en karakteriza maniero, kun adiaŭa transdonis en Esperanto flago kun Esperanto. Por la ferioj povas esti estimita Esperanto Ludoviko Zamenhof dediĉita okazaĵoj - naskiĝtago (decembro 15) kaj morto (14 de aprilo).

En Esperanto evoluis idiomoj, frazoj kaj diraĵoj, kaj kiu havas la valoron de Esperanto-kulturo kaj karakterizaĵoj de la medio. Ekzemplo estus la formuliĝo de ĝentileco "Samideano", tradukita kiel "Współideowcze". Ankaŭ ekzistas riĉa literaturo, kreita en Esperanto. Esperanto mitologio enhavas plejparte stereotipaj ideoj pri la rolo kaj ebloj de Esperanto, troigita lingvo emfazante facileco aŭ kredo "Fajna Venko" - la fina venko, tio estas, la ĝeneraligita adopto de Esperanto en interhomaj rilatoj.

Esperanta kulturo ankaŭ inkludas ritojn kaj simbolojn formante kaj subtenanta komunumo identeco Esperanton. Simboloj estas unuavice Esperanton emblemo (verda kvinpinta stelo), la himno ("La Espero" - Espero) kaj la flago, kaj la koloro de espero - verda. Aliaj simboloj estas la konturoj de la mondo (tutmonda kovrado de la lingvo), manpremo (amikeco), la turo de Babelo (nekapablo komuniki) kaj la arbo indikante kresko. Tiuj simboloj estas uzataj en multaj ĉiutagaj objektoj kaj conmemorativos erojn.

Konkludi ke la eniro "lingvo kiel perilo de Esperanto Esperanta kulturo" en la Nacia Kultura Heredaĝo Nemateria listo estis antaŭita de publika konsulto, kio rezultigis multajn voĉojn apogi tiun iniciaton fare de ambaŭ sin kaj la subtenantoj de Esperanto.

Gramatiko - Participoj Ja Estas Simplaj !

Participoj ja estas simplaj !

Kiel vi scias en Esperanto estas la jenaj sufiksoj por verbtempoj:

- is esprimas la pasintecon
- as esprimas la nuna tempon
- os esprimas la estontan tempon
- kaj
- us esprimas kondicionalon aŭ deziran formon
- u esprimas ordonon

Tiuj estas la simplaj temp-formoj, sed ili ne ĉiam sufiĉas esprimi ĉion. Do, estas pli komplikaj formoj de verboj por esprimi tempojn aŭ pli bone ni diru por esprimi la staton de la subjekto ĉar ili fakte estas adjektivoj, en la formo "estas + adjektivo". La verbo "esti" montras la tempo-punkton de la statuto aŭ de la adjektivo. Tiujn formojn ni nomas participojn.

Ili estas tre simplaj sed ofte lernantoj timas kaj ne povas uzi ilin, ĉar lernantoj, ne bone komprenas tiujn formojn.

Unue ni diru ke estas du formoj de la participo. La aktiva kaj la pasiva participo. Kutime en iu frazo estas du roluloj, la subjekto kiu aktivigas, kaj la objekto kiu

pasivas aŭ kiun la subjekto efektas. Do, per la aktiva participo ni esperimas tion, kion faras la subjekto. Kaj per la pasiva participo ni esprimas tion, kio okazas al la objekto.

Ni parolu kun ekzemploj!

Ni diru ke mi, ĉiu matene je la 8-a horo, trinkas teon. Do la subjekto estas mi kaj la objekto estas la teo.

Estas tri tempo-punktoj pri tiu okazaĵo. La statuto en la 7-a horo (antaŭ mi trinkis la teon), la statuto en la 8-a horo (dum kiam mi trinkas la teon), kaj la statuto en la 9-a horo (post mi trinkis la teon). Tiujn statutojn ni esprimas per la sufiksoj:

-inta, -anta, -onta por la aktiva parto kaj
-ita, -ata, -ota por la pasiva parto.

Plue estas tri pli ĝeneralaj tempo punktoj. La statuto de hieraŭ, la statuto de hodiaŭ kaj la statuto de morgaŭ. Tiujn ni esprimas per la verbo: estis, estas kaj estos.

Ho! mi aŭdas, ke vi diras, ke la afero jam fariĝis tre komplika. Sed tute ne!

Rigardu:

je la 7-a, mi estis trink-onta teon, kaj la teo estis trink-ota.	(antaŭ tiam)
Hieraŭ je la 8-a, mi estis trink-anta teon, kaj la teo estis trink-ata.	(tiam)
je la 9-a, mi estis trink-inta teon, kaj la teo estis trink-ita.	(post tiam)
je la 7-a, mi estas trink-onta teon, kaj la teo estas trink-ota.	(antaŭ nun)
Hodiaŭ je la 8-a, mi estas trink-anta teon, kaj la teo estas trink-ata.	(nun)
je la 9-a, mi estas trink-inta teon, kaj la teo estas trink-ita.	(post nun)
je la 7-a, mi estos trink-onta teon, kaj la teo estos trink-ota.	(antaŭ tiam)
Morgaŭ je la 8-a, mi estos trink-anta teon, kaj la teo estos trink-ata.	(tiam)
je la 9-a, mi estos trink-inta teon, kaj la teo estos trink-ita.	(post tiam)

Jen kelkaj ekzemploj.

- Hieraŭ je la 7-a, mi estis trink-onta teon kiam oni frapis la pordon.
- Estas la 9-a horo kaj mi jam estas fin-trink-inta la teon, do bedaŭrinde ne restis teo por vi.
- Morgaŭ je la 8-a, mi estos trink-anta teon, do se vi venos venu antaŭ la oka por ke ni trinku teon kune.



Ŝercoj

NEGOCIO KUN DIO

- Kara Dio, kio estas por Vi mil jaroj?
- Unu sekundo.
- Kara Dio, kio estas por Vi miliono da mono?
- Kiel unu centono.
- Tiam mi petegas de Vi, mia kara Dio, donu al mi kelkajn centonojn!
- Atendu sekundon!

VIVSEKURIGO

Maljuna viro iras al vivsekuriga agentejo, por fari kontrakton.

Sed la virino en la agentejo mire demandas:

- Kiomaĝa vi estas, avo?
- Mi estas 85-jaraĝa.
- 85! Kaj ĉu vi volas fari kontrakton pri vivsekurigo? Kion fari nun? Revenu morgaŭ.
- Morgaŭ ne estos bone por mi. Tiam estos la naskiĝtago de mia patro.
- La naskiĝtago de via patro? Kiomaĝa li estas?

- 103.
- Tiam revenu sekvontsemajne.
- La sekvontan semajnon estos por mi tute ne bone. Tiam estos la geedziĝfesto de mia avo.
- Ĉu la geedziĝfesto de via avo? Kiomjara li estas?
- 122.
- Ĉu li volas geedziĝi en tia maljuna aĝo?
- Li ne volas, sed liaj gepatroj treege volas tion...

LA DEVENO

Knabineto konversacias kun sia patro.

- Patro, paĉjo!
- Kio okazas, filino mia?
- De kie ni venis?
- Filino, la homo devenas de Adam kaj Eva. Iom konfuzita, la knabino kontestas:
- Sed paĉjo, panjo diris al mi, ke ni devenas de simioj!
- Vidu, karulino, estas tre simple. Unu afero estas la familio de via patrino; alia afero estas la mia.



Kruĉvort-enigmo



VERTIKALE

1. Interrilati per leteroj
 3. Frato de la patro aŭ de la patrino.
- Malgranda, malintensa.

Partikulo, esprimanta, ke oni malakceptas, rifuzas, rigardas kontraŭa al la realaĵo la ideon, pri kiu estas parolate

4. Ano de slava popolo, loĝanta precipe en Pollando. Tio, kion devas diri aŭ fari aktoro en teatraĵo aŭ filmo
5. Respekte honori, precipe per oferprezento. Tia, al kia inklinas nia koro, kaj kian ni volus plu teni al ni.
6. Tia konstruo, rigardata kiel vivejo de familio.
7. Grupo de du aferoj aŭ personoj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

8. Kolekto de objektoj de nia percepto aŭ pensado, konsiderata kiel finita tuto (baza koncepto en la matematiko).
9. Lando kie okazis la 101-a UK.
10. Parto de la korpo de bestoj aŭ homoj, kuniganta la kapon kun la trunko.

HORIZONTALALE

1. Fari la necesajn penojn, elpaŝojn, vizitojn ktp, por atingi ion, sukcesigi entreprenon ktp.
2. Vorto, uzata por distingi objekton aŭ estaĵon disde aliaj. Instrumento aŭ aparato.
3. Alvoko al la publiko per ĉiuspecaj rimedoj por laŭdi k rekomendi komercaĵon, entreprenon aŭ ian aferon.
4. Ago de tiu, kiu loĝas. Patro de patro aŭ patrino.
5. Prefikso montranta la sekvantan, supreniran aŭ malsupreniran gradon de parenceco.
6. Numeralo, esprimanta la nombron post 7.
7. Sufikso montranta estaĵon, apartenantan al la sekso organizita por gravediĝi kaj naski.
8. Nomo de urbo kie la 101-a UK okazis.
9. La ĉefa arterio, komenciĝanta ĉe la maldekstra ventriklo de la koro.
10. Silabo, kiu montras en la relativa solfeĝo la sesan tonon super la toniko. Vazo, tre diversa laŭ la materialo, formo kaj uzoj, ordinare destinita por kuirado.
11. Frakcio kun numeratoro egala al unu.
12. Ĉelo, produktata kaj ellasata de la inoj de animaloj, enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo.

Kuriu kun mi

KAREO DE KUKURBO

Hodiaŭ ni kuiras bongustan kaj simplan recepton kiu povas esti tre bona garnaĵo por niaj pladoj.

INGREDIENCOJ

500 gramoj de kukurbo
 100 gramoj de cepo
 500 mililitroj de lakto
 2 kuleroj de kareo
 salo
 supervirga oleo



Ni lavu, senŝeligu kaj tranĉu la kukurbojn en pecoj. Ni senŝeligu la cepon, tranĉu ĝin kaj kuiru ĝin en pato kun la oleo. Ni aldonu la du kulerojn de kareo. Ni solvu ĝin bone kun la lakto. Kiam ĝi bolas, ni aldonu la pecojn de la kukurbo kaj salu ĝin. Ni lasu ĝin boleti dum ĉirkaŭ 20 minutoj ĝis la kukurbo estas kuirita kaj la saŭco densa. Ni servu.

Bonan apetiton!

Fonto: <https://kuirukunmi.com/2015/03/27/kareo-de-kukurbo/>

Vortareto		lavi	yıkamak
kukurbo	kabak	senŝeligi	kabuklarını soymak
cepo	soğan	solvi	eritmek, iyice karıştırmak
kareo	köri	saŭco	sos, yemeğin suyu
suprevirga oleo	ekstra ekstra sızma yağ	densa	yoğun





La bela vetero ĉesis, kaj venis pluvo, kaj Andreo kaj Lizbeta ne povis ludi ekstere. Ankaŭ onklo Konrado ne povis labori en la kampoj, kaj restis en la oficejo.

Subite oni aŭdis frapon ĉe le pordo, kaj onklino Maria malfermis ĝin.

"Ĉu mi povas vidi s-ron Parano?" diris vira voĉo,

kaj post momento la onklino iris al la oficejo. Lizbeta, kiu sidis en la manĝoĉambro, vidis malantaŭ ŝi policanon! La onklino anoncis lin al la farmisto, kaj ili ambaŭ eniris la oficejon. Lizbeta rapide supreniris al la dormĉambro de Andreo, kie ŝia frato sidis kaj legis. Sen unu vorto ŝi malfermis la fenestron kaj rigardis suben. La oficejo estis sub la dormĉambro, kaj ĝia fenestro estis iomete malfermita. Lizbeta signis per la mano al Andreo, kaj li venis al la fenestro.

"Estas policano en la oficejo kun la geonkloj," flustris la knabino.

De la oficeja fenestro ili povis aŭdi voĉojn, sed ili ne povis distingi vortojn. Kial la policano venis? Ĉu lia vizito rilatis al la misteraj pakaĵoj?

Subite ilia onklo levis la voĉon kvazaŭ en kolero, kaj la geknaboj klare aŭdis tion, kion li diris.

"Mi diras al vi, ke mi scias nenion pri la afero," venis la voĉo. "Serĉu tra la domo, se vi volas; mi certigas al vi, ke vi trovos nenion."

La voĉoj daŭris pli mallaŭte, kaj post kelkaj minutoj la ĝemeloj denove aŭdis la onklon.

"Mi jam invitis vin," li kriis. "Serĉu tra la domo, se vi ankoraŭ havas dubojn."

"Bone," respondis la voĉo de la policano. "Mi tion faros kun via permeso." Kaj la voĉoj ĉesis.

La gefratoj aŭdis paŝojn malsupre kaj sciis, ke la tri personoj trairas la subajn ĉambrojn. Baldaŭ ili aŭdis la grincon de la kelopordo, kaj paŝoj malsupreniris. Poste ili revenis kaj suprenvenis al la dormĉambroj.

Tiu de Andreo estis la plej proksima al la ŝtuparo, kaj la paŝoj haltis ekster la pordo.

Oni frapis; la pordo malfermiĝis, kaj onklo Konrado envenis kun la policano kaj la onklino malantaŭ li.

"Ĉi tiu sinjoro volas ĉirkaŭrigardi la ĉambrojn," diris la onklo. "Miaj genevoj," li klarigis al la policano.

La ĉambro estis tre malgranda kaj estis evidente, ke oni ne povus kaŝi ion en ĝi. La policano baldaŭ eliris, kaj la geonkloj sekvis lin. La infanoj aŭdis iliajn paŝojn kaj voĉojn dum ili eniris la aliajn ĉambrojn, sed ili ne restis longe, kaj baldaŭ malsupreniris la ŝtuparon.

Tiam oni aŭdis la dompordon fermiĝi kaj la geonkloj revenis kaj iris en la oficejon.

Denove, tra la nefermitaj fenestroj, Andreo kaj Lizbeta aŭdis la voĉojn. Dum kelkaj minutoj ili parolis mallaŭte, tiam onklino Maria parolis pli laŭte kaj la infanoj aŭdis ŝin.

"Sed Konrado," ŝi diris, "la afero devas ĉesi. La polico evidente suspektas ion. Oni rigardos. Estas tro danĝere."

La onkla voĉo respondis mallaŭte. Ŝajne li provis trankviligi ŝin.

Sekvis kelkaj momentoj de mallaŭta interparolo, tiam la onklo parolis pli laŭte.

"Ne estu malsaĝa," li diris. "La policano estis tute kontenta. Li trovis nenion. Estas nenia danĝero. Ĉiuokaze mi devas iri jaŭdon, ĉar mi ne havas tempon averti ilin."

La junaj aŭskultantoj aŭdis nenion plu, sed ili jam aŭdis sufiĉe. La onklo evidente estis kontrabandisto; la polico suspektis la veron, sed ne povis trovi ion, kaj la onklo intencis iri jaŭdon por alporti alian pakaĵon.

"Se li vere estas krimulo," diris Lizbeta; "mi ĝojas, ke li ne estas nia vera onklo. Imagu! Havi krimulon en la familio!"

"Krimulo?" diris Andreo. "Kontrabandisto ne estas krimulo! Li estas bona, ekscita persono. Mi ne kredas lin krimulo."

Ili pensis dum kelkaj minutoj.

"Nu," diris Andreo, post paŭzo, "ni devos resti vestitaj jaŭdon nokte, kaj sekvi lin kiam li eliros."

"Sed kiel ni povos iri el la domo?"

"Tra la fenestro de via ĉambro. La lignobudo estas sub la fenestro, kaj ni povos facile grimpi sur la tegmenton kaj de tio ĝis la tero. Mi lasos keston apud la muro por faciligi nian revenon."

Estis tiam mardo kaj ili devis atendi dum du tutaj tagoj. Ili ludis dum tiuj du tagoj, sed ĉiam ili vere pensis pri jaŭdo kaj pri la aventuro, kiu atendas ilin en tiu nokto. Ili devis rigardi nek la kelon nek la vojon, ĉar ili sciis, ke nenio okazos antaŭ la nokto de jaŭdo, kaj tiam ili estos tie por vidi ĉion.

(daŭrigota)

La 50-a Kongreso de ILEI en 2017 okazos en Busan, Koreio

Karaj,

Ĝus komenciĝis la 101-a UK en Nitra, ILEI kongresos tujposte - ekde sabato - en Nyiregyhaza, Hungario, kaj ĝus anoncis sian jubilean 50-an kongreson en la jaro 2017, laŭkutime kunordigotan kun UK.



La 50-a Kongreso de ILEI okazos en Busan, 15–22 julio 2017, antaŭ la 102-a UK okazonta en Seulo. LKK organizos karavanan veturon el Busan al Seulo por partoprenantoj de ambaŭ eventoj. La kongresa ĉeftemo de ILEI 2017 estos "Edukado al respektoplena turismo" omaĝe al la Internacia Jaro de Daŭropova Turismo deklarita de UN, kaj al la subteno de la Korea Turisma Organizo al ambaŭ kongresoj, UK kaj de ILEI.

Busan estas la dua plej granda urbo de Korea Respubliko ĉe la suda marbordo, ĝia grava turisma centro kaj granda havenurbo, kiu tra la historio rolis kiel pordo al eksteraj landoj. Ĝi harmonie kunigas la tradician kaj modernan vizaĝojn, kun belaj temploj kaj spirhaltigaj modernaj konstruaĵoj. Dum la Korea milito ĝi restis neokupita de malamiko kaj tien venis rifuĝintoj el ĉiuj anguloj de la tuta Koreio. Tial, iliaj kulturoj estas harmonie interplektitaj en la urbo Busan.

La kongresejo, la moderna junulargastejo ARPINA, situas ĉe la fama 12 km longa strando Haeundae, la plej ŝatata de ne nur koreoj, sed ankaŭ de alilandaj vizitantoj, kie somere svarmas pli ol miliono da homoj. Multaj turismaj celoj kaj vizitindaĵoj troviĝas je promendistanco de ĝi, aŭ atingeblas per mallongdaŭra metro-veturo.

ARPINA disponas komfortajn dormoĉambrojn en ambaŭ eŭropa kaj korea stiloj, diversstipajn kaj diversgrandajn salonojn por diversaj kongresaj programoj, restoracion, bufedejon kaj sportajn ejojn kaj instalaĵojn, kiujn la kongresanoj povos uzi, ĉio sub unu tegmento kaj ĉio bonpreza, kun specialaj rabatoj por la grava evento de ILEI.

Bonvenon ĉe ILEI en Busan!

Radojica Petroviĉ,
Estrarano pri konferencoj
de ILEI



La Slovaka Poŝt-oficejo eldonis novan poŝt-markon okaze de la 101-a UK en Nitra

Lige al la 101-a Universala Kongreso en Nitra okazis nekutima en la nuna epoko evento: eldono de porokaza poŝtmarko kun Esperanto-rilata temo.

La poŝt markon desegnis slovaka artisto Igor Benca. Ĝi havas valoron de 1.20 € kaj la poŝt-oficejo eldonis entute 300 mil ekzemplerojn. La vizaĝoj kaj sagoj sur la poŝtmarko montras reciprokan komunikadon.





La 101-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2016 en la urbo Nitro de okcidenta Slovakio. La kongresa temo estis "Socia justeco — lingva justeco". Temis pri la unua Universala Kongreso en Slovakio, se oni ne konsideras la 13-an kongreson okazintan en Prago kiam ĝi estis ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio.

Pri okazigo de la kongreso okupiĝis membroj de Slovaka Esperanta Federacio kaj Slovaka Esperanta Junularo kun helpo de aktivuloj el najbaraj kaj aliaj landoj. En Nitro jam okazis trifoje Somera Esperanto-Studado, aranĝita de la teamo de E@I (kiu havas oficejon en Slovakio), kaj lokaj kaj regionaj reprezentantoj regule aŭspicias Esperanto-renkontiĝojn tie. Fine de la jaro 2014, la prezidento de Slovakio Andrej Kiska fariĝis la Alta Protektanto de UK en Nitro kaj la tiama direktoro de la Slovaka Poŝto anoncis eldonon de aparta poŝtmarko okaze de la 101-a UK. Ĝi estos unu el du specialaj emisioj de poŝtmarkoj en Slovakio en 2016, la dua temas pri eŭropunia prezidanteco de Slovakio. Temas pri la unua emisio de poŝtmarkoj kun esperanta temo en sendependa Slovakio.

La 20-an de februaro 2015 la LKK lanĉis publikan konkurson pri emblemo por UK 2016. Kiel gajninton oni la 23-an de majo anoncis la rusan esperantistinon Elena Ĥusanova, kies propono estis elektita de ĵurio el inter 48 proponoj alsenditaj de 11 partoprenantoj.

Jaron antaŭ la kongreso, en aŭgusto 2015, okazis en Nitro la 88-a kongreso de SAT.

Je la 13-a de decembro 2015 Johannes Mueller kaj Eva Fitzelová publike anoncis sian planon pri interreta elsendo el UK 2016 kadre de ilia projekto Movada vidpunkto.

En januaro 2016 Eŭropa Esperanto-Unio anoncis, ke dum UK 2016 okazos ĝiaj asemblea kaj estrara kunsidoj anstataŭ planita Eŭropa Kongreso de EEU.

Pri la okazigo de UK en Nitra informis kelkaj ĵurnalistaj slovakaj retejoj jam dum la jaro 2015. Retejo topky.sk mallonge informis pri UK 2016 ankaŭ rilate al

gefianĉiĝo de Peter Baláž kaj Dorota Rodzianko dum la fermo de UK 2015.

La urbo kunlaboris pri propagado de UK 2016 kaj de Esperanto kun la organizantoj de la UK. En la urbo aperis dek afiŝegoj (billboard-oj), dek lumigitaj afiŝoj (citylight) kaj du rondaj afiŝoj en la urbocentro, kiuj informis pri la okazaĵo. Aldone du busoj afiŝis pri Esperanto per tutsurfaca reklamo.

En la aĉetcentro "Centro" en Nitra okazis dum la tuta julio ekspozicio pri Esperanto.

Dum la kongreso mem okazis Nacia vespero sur la ĉefplaco de Nitra, malfermita tago por la neesperantista publiko kaj malfermita internacia muzikfestivalo (la lasta ankaŭ sur la ĉefplaco).

La kongresa kuriero nomiĝis ĉijare Pribina laŭ fama loĝanto de Nitro, la princo Pribina (ĉ. 800-861). La kurieron oni disdonadis ĉe la informejo. Ĝi estis ankaŭ disponebla en la kongresa retejo de UEA.

La kongresejo okazis sur la grundo de la Slovaka Agrikultura Universitato. Ĝi estas unu el trideko da slovakaj universitatoj kaj altlernejoj kaj fondiĝis jam en 1946 kiel Altlernejo de agrikulturista kaj forstista inĝenierado en Košice, el kiu en 1952 estiĝis du memstaraj altlernejoj el kiu unu estas Agrikultura altlernejo en Nitro. Apud la universitato troviĝas botanika ĝardeno.

Dum la UK en Slovakio aperis nova Esperanta poŝtmarko, eldonita de la Slovaka Poŝto. Ĝia bildo aludas al la interpersona komunikado, kaj enhavas ankaŭ Esperantan emblemon. Nominala valoro de la marko estas 1,2 eŭroj.

Antaŭ la UK okazis 20-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso kaj 69-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, dum la UK okazis 45-a Internacia Infana Kongreseto, Interreligia forumo en Centra Eŭropo – CEIF 2016, Lingvopolitika konferenco de landoj V4+ kaj post la kongreso okazis en Nitro 82-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj.

Jen ligiloj en jutubo por videaĵoj pri la diversaj okazaĵoj en Nitro:

https://www.youtube.com/results?search_query=manifestacio+101+uk+nitra

Vilmos BENCZIK (Hungario) naskiĝis en 1945.

Profesie li estis profesoro en altlerneja fakultato de la universitato ELTE en Budapeŝto. Li lernis E-on en 1959, aliĝis al UEA en 1966 kaj iĝis dumviva membro en 1977. Li estis komitatano de TEJO 1964-1968 kaj estrarano de Hungara E-Asocio 1965-1967 kaj 1978-1992. Li redaktis la revuon Hungara Vivo 1977-1982 kaj de 1976 ĝis 1990 gvidis la eldonejon de HEA, ĉe kiu aperis 138 libroj en/pri E-o en la suma kvanto de 368 mil ekz. Li estis LKK-ano de la 68-a UK en Budapeŝto en 1983, komitatano de UEA 1980-1986 kaj prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1986-2002. Li verkis recenzojn por multaj revuoj, parte kolektitajn en Studoj pri la Esperanta literaturo (1980), kaj abunde artikolis kaj tradukis. Li redaktis i.a. Libro de romanoj (1979), Ŝercoj, rakontoj (1972, 2-a eld. 1974), 25 jaroj: antologio de Belartaj Konkursoj (kun W. Auld; 1977), La kato en la sako (legolibro; 1978), Baza literatura krestomatia (1979, 3-a eld. 1986), Hungara antologio (1983), Mi vizitis mian farmon (antologio de E-literaturo en la hungara kaj E-o; 1987) kaj Lingva arto (jubilea libro por W. Auld kaj M. Boulton; 1999). Ekde 2001 Benczik estas membro de la Akademio de E-o.

Petr CHRDLÉ (Ĉeĥio) naskiĝis en 1946. Li diplomiĝis kiel elektroteknika inĝeniero kaj doktoriĝis ĉe Instituto pri Elektroniko kaj Radiotekniko de la Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj. Chrdle estis estrarano de Ĉeĥa E-Asocio 1987-2011, i.a. prezidanto 1987-1993, kaj fariĝis ĝia honora membro en 2008. Rajtigita ekzamenanto de UEA/ILEI, li verkis kun sia edzino Stanislava (1954-2000) la lernolibrojn Esperantem za tři měsíce ("Per E-o dum tri monatoj"; 1995, 3-a eld. 2006) kaj Esperanto od A do Z ("E-o de A ĝis Z"; 2016). Li verkis Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj (1995; 3-a eld. 2013) kaj redaktis i.a. la prelegarojn La stato kaj estonteco de la internacia

lingvo Esperanto (1995) kaj Intimaj temoj en la Esperanto-beletro (2005). Docento de AIS, li oficis kiel ĝia senata sekretario 1990-1994. Li estis komitatano de UEA 1987-2010 kaj estrarano pri faka kaj scienca agadoj 1998-2001. En 1992 li fondis la kongresan kaj klerigan agentejon-eldonejon KAVA-PECH, sub kies ŝildo li fariĝis unu el la plej gravaj nuntempaj E-eldonistoj. Li eldonis pli ol 170 titolojn, i.a. tri en la Serio "Oriento-Okcidento", kaj eĉ pli grandan nombron por klientoj en- kaj eksterlande. Li organizis ankaŭ ses Konferencojn pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (KAEST; 1998-2008).

SO Gilsu (Korea Resp.) naskiĝis en 1944. Li doktoriĝis en 1979 kaj ekde tiu jaro estis profesoro pri ekonomiko en la Universitato Sokyong en Seulo. Li estis ankaŭ direktoro de la Korea Asocio pri Ekonomika Historio kaj prezidanto de la Instituto pri la Historio de Kogurjo. Li lernis E-on en 1966 kaj unue aktivis en la junulara movado, i.a. kiel prezidanto de Korea E-Junularo. Li estis sekciestro de ILEI en Koreio kaj vicprezidanto de Korea E-Asocio. En UEA li membriĝis en 1971 kaj estis komitatano kaj estrarano pri la azia agado kaj pri faka kaj scienca aplikado 1989-1995. Kiel estrarano li redaktis la bultenon Esperanto en Azio 1990-1993 kaj fondis la Komisionon pri Azia E-Movado en 1994. Li prelegis en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Varno (1978), Braziljo (1981), Budapeŝto (1983), Varsovio (1987) kaj Seulo (1994). Krome, en la 97-a UK en Seulo li estis rektoro de IKU. So aŭtoris la lernolibrojn Kursolibro de Esperanto (7-a eld. 1982) kaj Praktiko de Esperanto (1976, 2-a eld. 1981). Li instruis E-on i.a. en pluraj koreaj universitatoj, en la Nord-Amerika Somera Kursaro en San-Francisko kaj en Aŭstralio. En lia traduko aperis en 1983 la libroj La sindonema arbo kaj Mi serĉas mian perditan... de Shel Silverstein.

"Pribina" la kongresa kuriero de la 101-a UK



Pribina (ĉ. 800861) estas la princo, kiu kristaniĝis kaj konstruigis la unuan kristanan preĝejon en slava teritorio en Orienta Eŭropo, en loko, kiu supozeble estis la nuna Nitro en 827. Pro tio la ĉi jara

Kongresa Kuriero estis nomita "Pribina".

Vi povas elŭti la 7 numerojn de tiu gazeto el la retpaĝo de UEA. Jen la ligilo: <http://uea.org/kongresoj>

La 42 komitatanoj e la unua tago de UK kiuj voĉdonis kaj faris elektojn en granda unuanimeco. Aldone al la komitataj reviziantoj (Ans Bakker-ten Hagen kun 39 voĉoj kaj Flory Witdoeck kun 40 voĉoj) kaj la membroj de la Komisiono pri Statutoj de la Landaj kaj Fakaj Asocioj (Mireille Grosjean kun 38 voĉoj, Ulrich Lins kun 38 voĉoj kaj Brian Moon kun 41 voĉoj) okazis ankaŭ balotoj por la estraraj oficoj.

Mark Fettes estis reelektita kiel Prezidanto (36 voĉoj por), Stefan MacGill kiel Vicprezidanto (39 voĉoj por) kaj Martin Schäffer kiel Ĝenerala Sekretario de UEA (35 voĉoj por).

Sube vi povas legi iliajn mallongajn vivresumojn, kaj la vivresumojn de la aliaj tri estraranoj, Emilio Cid, Lee Jungkee kaj Maria Rosaria Spanò.

Emilio Carlos Vaz Cid (1960), San-Paŭlo, Brazilo; komercisto. Instruisto pri la germana, ekinstruis Esperanton en 1981 en la ŝtata universitato UNICAMP, kaj estas diplomita pri sociaj sciencoj ĉe UNIMES. Estrarano de la asocio Libero por la Lingvoj kaj ĉefdelegito de UEA por Brazilo. Delonga aktivulo pri informado.

Mark Fettes, Prezidanto de UEA ekde 2013, verkinto de la Manifesto de Prago, iama oficisto de UEA kaj redaktoro de revuo Esperanto. Civitano de kvar landoj (Britio, Usono, Novzelando, Kanado); nuntempe loĝas

en Vankuvero, Kanado, kie li estas profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser.

Lee Jungkee, Naskiĝis en Koreio en 1953. En la univ. Youngnam studis administradon kaj plu studis planologion En 2002 premiito de la Premio Deguchi. Stariginto de la Seula Esperanto-Centron en 1991 kaj instruas Esperanton kiel docento en la univ. Kyunghee. Estrarano de UEA ekde 2013.

Stefan MacGill, Vicprezidanto de UEA ekde 2013. Motoro de la programo pri Aktivula Maturigo (AMO), kaj prizorginto de 22 seminarioj. Kreinto de ĉ 120 komunikoj por Landaj Asocioj kaj aliaj. Aktive apogas la kreskigon de rimedoj por Movada Evoluigo de €10,000 ĝis 100,00 ene de ses jaroj.

Martin Schäffer, Ĝenerala Sekretario de UEA ekde 2013. Firma kredanto pri la bezono pli forte investi rimedojn en movada evoluigo, specife en nia informa agado. Naskiĝis en Germanio en 1962, vivas delonge en Meksiko. Diplomito pri publika administrado (specialaj kampoj ekonomio kaj juro; FH Ludwigsburg).

Maria Rosaria Spanò, Nova estrarano, kun sperto el TEJO precipe pri eksteraj rilatoj kaj aktivula trejnado. Naskiĝis en Torino, Italio en 1981, doktoro pri klasika filologio kaj literaturo, profesie kvalifikita arĥivisto (2005-2007) kaj projektmastrumanto (2012).



En la Solena Fermo de la 101-a UK en Nitro oni anoncis la nomojn de 14 esperantistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per

Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Elstara Arta Agado:

- Ĵomart Amzejev kaj Natalja (Nataŝa) Gerlach (Svedio) pro longtempa kontribuado al la Esperanto-muziko;
- Jean Codjo kaj Adjévi Adjé (Kanado, Togolando) pro longdaŭra agado por Afrika Esperanto-Movado;
- Ilia Sumilfia Dewi (Indonezio) pro kontribuoj al la movado en Sudorienta Azio;

- Ruth Keves-Cohen (Usono) pro granda kontribuo al la kreo kaj subtenado de la E-kurso ĉe Duolingo;
- Tatjana Loskutova (Rusio) pro instruado de Esperanto en aziaj landoj;
- Márkus Gábor (Hungario) pro kontribuoj al la Esperanto-literaturo kaj al la disvastigo de Esperanto en Azio;
- Judith Meyer (Germanio) pro kontribuoj al la diskonigo de Esperanto en interreto;
- Jorge Montanari (Argentino) pro la iniciato kaj gvidado de la futbalteamo Esperanto;
- Wladimir Opoka (Pollando) pro multjara kontribuado al la medicina agado kadre de UMEA;
- Leopold Patek (Aŭstrio) pro longtempa gvida rolo en la aŭstria movado kaj 25-jara ĉefdelegiteco de UEA;
- Syōzi Keiko (Japanio) pro longtempa gvida rolo en la japana Esperanto-Movado;
- Ján Vajs (Slovakio) pro fakaj kaj primovadaj verkoj.



Stefano Keller, ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo ĉeestis la 9-an sesion de Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP, 11-15 julio 2016).

Keller intervenis pri la tagorda punkto 7: La celoj de la daŭripova evoluo kaj la rajtoj de indiĝenaj popoloj. Li atentigis pri la signifo de konoj de indiĝenaj popoloj pri naturo, konservado de la vivdiverseco, kiuj estas pluportataj per iliaj lingvoj. Li substrekis, ke la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj.

Li citis partojn el la Deklaracio de la 64-a Konferenco de Ne-Registaraj Organizaĵoj, organizita de UN en Bonn, Germanio (2011), pretige al la konferenco "Rio+20". Tiam, Keller sukcesigis kun sia teamo akceptigi en pluraj frazoj de la Deklaracio ĉiujn

proponojn de UEA pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto, eĉ du kompletajn alineojn, el kiuj li citis tiun: "Ni alvokas pri la respekto kaj inkludo de la etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiuj entenas informojn pri la komplekseco de la naturĉirkaŭaĵo, kaj alvokas pri la konsidero de la ebleco utiligi neŭtralan internacian lingvon, facile lerneblan."

Li subtenis la intervenojn de aliaj reprezentantoj, kiuj parolis pri la graveco de gepatrolingva edukado kaj pri la malrespekto de lingvaj rajtoj de indiĝenoj. En la tutsemajna sesio, per diverslingvaj informiloj, en personaj kontaktoj kaj en sia alparolo, Stefano Keller zorgis pri abunda informado pri UEA, Esperanto, la Esperanto-Tago/Lingva justeco kaj la 101-a UK.

Pliaj informoj : <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/#EMRIP9>

Esperanto Tago




26 Temmuz'da tüm dünya Esperanto topluluğu birlikte Esperanto gününü ya da daha doğrusu "ilk kitabın" yayınlanışını kutluyor. 1887 yılının 26 Temmuz gününde yayınlanan bu kitap insanlar arasındaki iletişim engellerini yıkacak yeni bir dilin dünyaya teklif edildiği gündür. Dil kısa süre sonra Esperanto adı ile

anılır olacaktı.

26 Temmuz 1887 günü, Rus imparatorluk sansür kurulu Varşova'lı genç doktora kitabını yayınlamasına izin verdiği gündür. Kitapta tanıtılan dilin amacı tüm dünya milletlerini, etnik ve ulusal sınırların ötesinde, bir araya getirmeyi amaçlıyordu. Bu "ilk kitabı" kısa süre içinde başkaları izleyecekti ve dili benimseyen bir grup insan bu dilin yayılmasını destekleyecek ve sonuç olarak bugün, yani 129 sene sonra, hala herkese ait olan ve kimsenin konuşurken kendisini yabancı

hissetmediği bir dil haline dönecekti.



Esperanto dilinin temelinde, bu dili konuşanların arasında eşitlik sağlayan bir yaklaşım söz konusudur. Bundan dolayı UEA yani Uluslararası Esperanto Birliğinin bu yıl tasarladığı poster üzerinde "Adil İletişim" ifadesi yer almaktadır. Her sene "Adil İletişim" kavramını dünyaya yaygınlaştırılmasına çalışılıyor ve Esperanto Günü o sene yapılan Uluslararası Kongre haftasının içinde yer alıyor. Kongrenin bu seneki ana teması "Sosyal Adalet - Dil Adaleti" idi.

Posterin Türkçe sürümünü sağda yukarıda, ilk kitabın ilk yayınlandığı dil olan Rusça kapağını de solda görebilirsiniz.



Saluton,

En ci tiu numero de nia revueto ni daurigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Sankta Augusteno.

Vasil Kadifeli

Boecio (Boethius 475-525 P.K)

Se vi estus kondamnita al morto kaj estus en malliberejo atendante vian mortopunon, ĉu vi elspezus viajn lastajn tagojn verkante filozofian libron? Boecio (Ancius Manlius Severinus Boethius) faris ĝustetion kaj tiu libro poste fariĝis sia plej grava libro.



Li estis unu el la lastaj Romiaj filozofoj, antaŭ ol 20 jaroj de la okupiĝo de Romio per la barbaroj. Li, kiel Cicerono kaj Seneko, pensis, ke filozofio estis abstrakta pensmaniero sed ankaŭ afero pri persona disvolviĝo. Li tradukis la verkojn de Platono kaj Aristotelo, do, li kunligis sian pensmanieron kun ili. Lia tradukado de tiuj verkoj savis ilin de pereco ĉar ili estis en la rando de forgeso en la tiama tempo. Li estis kristano, do, lia filozofio fariĝis ponto de la antikva greka kaj romia filozofio al la posta kristana filozofio.

La gota reĝo Teodoriko kiu regnis en la tiama Romo faris lin kaj liajn filojn konsulojn. Li estis tre okuopita per la ŝtataj aferoj se li sukcesis trovi tempon por filozofio. Do, ĉio estis en ordo kaj bona por li. Sed poste, oni akuzis lin pri intrigo kontraŭ Teodoriko kaj li ne povis pruvi ke li estis senkulpa.

Dum en malliberejo li verkis unu el la plej famaj verkoj "Pri konsoligo per la filozofio". En sia verko li priskribas virinon kiu subite aperis antaŭ li, virino kun eksterordinara alteco, kiu portis ĉifonitan robon sur kiu estis brodita ŝtuparo, kaj sur ĉiu ŝtupo estis broditaj la grekaj literoj el "pi" ĝis "teta". En unu mano ŝi tenis la

sceptron de reĝa potenco kaj per la alia ŝi tenis librojn. Fakte tiu virino estis reprezentanta la filozofion kaj ŝi estis kolera al Boecio ĉar li forgesis kiel li devis konduki kaj al kion li devis kredi. En la libro, Boecio priskribas la konversacio de Dio kun "sorto". La libro parte estas prozo kaj parte poezio. La virino aŭ filozofio faras sugestojn al Boecio. Ŝi insturas ke sorto povas ĉiam ŝanĝiĝi en vivo kaj li ne devas miri pri tio. Se vi estas bonsorta hodiaŭ tio ne signifas ke vi estos bonsorta ankaŭ morgaŭ. Homoj kiuj kunligas siajn feliĉon al sorto estas stultuloj. La vera feliĉo venas de la interno de homo el aferoj, kiujn la homo povas kontroli. Do oni devas filozofie konduki malbonsorton. EN vivo nenio estas malbona, tio, kio gravas estas kiel ni pensas pri tiaj aferoj. Do, tiu fakte estas la filozofio de Epikteto.

Riĉeco, povo kaj respekto estas forpasantaj aferoj. Filozofio estas medikamento por malaltigi dolorojn de vivo. Per morto oni perdas ĉion. Sed Boecio kredis je postmorta vivo. La vera feliĉo troviĝas en Dio kaj bono.

Boecio vivis en la fruaj jaroj de Kristanismo sed li ne nomis pri kiu Dio li parolis en sia libro. Ĉu la Kristana Dio aŭ la Platona Dio? Dio estas perfekta, ĉiopova kaj scias ĉion. Do iasence Dio kontrolas la postan paŝon de homo. Alie, kiel la homo povus memvole kaj libere elekti tiun paŝon. Ĉu ni vere havas liberan elekton? Do, se ni vere ne kondutas libervole do, tiam kial ni estu punitaj pro la malbonaĵoj ni faras? Ĉu tiu estas vera justeco? Tiu estas nomata la "paradokso de filozofio" kaj ĝi estas tre grava konfuzaĵo.

La virino havis respondojn por tiuj demandoj. Laŭ ŝi ni ja havas liberan memvolon. Eble Dio scias kiu estas nia posta paŝo sed niaj vivoj ne estas antaŭdeterminitaj. Ni ja povas libere elekti nian postan paŝon. Dio scipovas ĉion samtempe. Tio estas li scias nian pasintecon, estantecon kaj estontecon samtempe. Por li ne estas tempo. Sed ni la mortintoj nur povas vidi kaj kompreni la okazaĵon en nia vivo en sekvenco. Kaj ni ne forgesu ke Dio juĝas niajn kondutojn.

(daŭrigota)

EI UNUA PARTO - TAŬO



03

Oni ne honoru la kapablulojn. Tiel oni atingas, ke la popolo ne kverelas.
Oni ne ŝatu rarajn aĵojn, tiel oni atingas, ke la popolo ne ŝtelas.
Oni ne montru dezirindaĵojn, tiel oni atingas, ke la koro de la popolo ne konfuziĝas.

Tial la kapablulo regas tiel:
Li malplenigas iliajn korojn kaj plenigas iliajn stomakojn.
Li malfortigas iliajn volojn kaj plifortigas iliajn ostojn kaj li atingas, ke la popolo restas sen scio kaj sen deziroj, kaj li zorgas por tio, ke la sciantoj ne aŭdacos agi.
Li faras tion nefare, tiel ĉio enordiĝas.

(03) Rimarko de Cezar

Ke multe da sciado ankoraŭ ne saĝigas, estas penso, kiu por la greka filozofa Heraklito estis grava.

Rimarko de Wang Chonfang

„Dum la Periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a.K.), por kontentigi la deziron de la feŭda reganta klaso aboli la sistemon de la hereda regna oficisteco, la Leĝistoj kaj Moistoj proponis honoradon de kapabluloj, por ke nekapablaj aristokratoj povu esti degraditaj al nobeleco dum kapablaj nenobelaj povu fariĝi regnaj oficistoj.“

04

La TAŬO torentas ĉiam.
Sed ĝi neniam pleniĝas efikante.
Abismo ĝi estas, kiel la prapatro de ĉiuj aĵoj.
Ĝi mildigas ilian akrecon.
Ĝi solvas ilian konfuzon.
Ĝi limigas ilian brilon.
Ĝi unuiĝas kun ilia polvo.

Mistera ĝi estas kaj tamen reala.
Mi ne scias, kies filo ĝi estas.
Ĝi ŝajne estas pli frua ol Dio.

(04) Rimarko de Cezar

Por tiuj, kiuj volas fari el Laocio religian instruiston, estu dirita, ke li mem videble ne tre ŝatis la ideon pri Dio. Por Laocio Dio estas ne pli ol aldonajo. Antaŭ Dio jam estis io! Tio estas fakte blasfema. Min pensigis la lasta linio tuj pri „la praeksplodo“ el la kosmologio. Do ne Dio kreis la praeksplodon, sed la praeksplodo kreis ankaŭ Dion, laŭ Laocio! Nekredeble! Kiel li povis jam pensi tion! Ĉu ne mirinde, tiu penso, ses jarcentojn antaŭ Kristo?!

05

Ĉielo kaj Tero ne preferas iun.
Laŭ ili la homoj estas kiel pajlhundaj oferoj.
La saĝulo ne preferas iun.
Laŭ li la homoj estas kiel pajlhundaj oferoj.
La interspaco inter Ĉielo kaj Tero estas kiel fluto malplena kaj tamen ĝi ne kunfalas; movate eliras pli kaj pli el ĝi.
Sed multaj vortoj elĉerpiĝos.
Pli bone estas konservi la internan.


(05) Rimarkoj de Cezar

„Bonecon“ kaj „moralecon“, la plej altaj kategorioj de la fama Konfuceo, Laocio ne akceptas. La traduko „fluto“ anstataŭ „balgoblovilo“ sekvas al Liang Ki Tŝau. Wang Chongfang, certe pli ĝuste, pro la sekvaj linioj, tradukis per „balgoblovilo“. (cez)

PIV: Konfuceo/o. ĉina filozofa, politikulo kaj edukisto (551.479 a.K.).



Mortis Paul Gubbins - Portreto



Paul GUBBINS naskiĝis la 8-an de novembro 1949 en la banurbo Southport en nord-okcidenta Anglujo (la urbo fariĝis fono de la lernolibro Kunvojaĝu!). Li studis la germanan kaj la francan ĉe la Universitato de Manĉestro kaj diplomitiĝis en 1972. Studinte en Kanado, li doktoriĝis en 1978 ĉe Queen's University, Ontario, per disertacio pri la germana verkisto E.T.A.Hoffman. Denove en Britujo, li trejniĝis kiel ĵurnalisto sed fine ekinstruis la germanan ĉe universitato en nord-okcidenta Anglujo. En 2004 li magistriĝis pri aplikado de komputilaj teĥnologioj en edukado. Pro kolapso de lingvo-lernado en Britujo, kaj en lernejoj kaj en universitatoj, li frue emeritiĝis kiel docento pri la germana kaj ekde 2005 instruas ĵurnalismen ĉe Staffordshire University.

Li esperantistiĝis en 1984 kaj sendis sian unuan artikolon al Monato en 1986. En 1990 li fariĝis redaktoro pri la rubrikoj Moderna Vivo kaj Politiko. Ekde 2000 li redaktas La Brita Esperantisto. Plurfoje premiita en la belartaj konkursoj de UEA (ĉefe, sed ne ekskluzive, en la branĉo "teatro"), li aperigis plurajn teatraĵojn: la kolektojn Konto de l' vivo (1998) kaj La verda ranaro prezentas (2006) kaj la unuopajn dramojn Heksakloro unu komo tri (2005) kaj Zam-Zam- Zamenhof (2006). Krome li aŭtoris rakontojn kaj artikolojn en diversaj periodaĵoj, inkl. de Fonto kaj Beletra Almanako.

Lia lernolibro Kunvojaĝu! (1993; dua eldono 2006) ricevis en 1996 OSIEK-premion. Li verkis la vidbendserion Pasporto al la tuta mondo (1998; DVD

2005); la ekzercaron Subtekste (1998; dua eldono 2002); du aŭdkomprenajn kompaktdiskojn Verdaj Voĉoj (2004; 2007), kaj kontribuis per interagaj ekzercoj al edukado.net.

Dum 15 jaroj li respondecis pri la esperanta somera kursaro en Barlastono, Britujo, kaj ankoraŭ respondecas pri tieaj seminarioj. Li instruis Esperanton aŭ prie prelegis ekster Britujo i.a. en Francujo, Majorko, Italujo, Svedujo kaj Usono (tri fojojn ĉe NASK).

Li membras en la Akademio de Esperanto kaj en la Akademio Literatura de Esperanto. Aktuale li okupiĝas pri esploroj rilate originalajn esperantajn dramojn kaj pri dulingva volumo (angla/esperanta) pri Esperanto-literaturo. Bedaŭrinde la du projektoj signifas malpli da tempo por instruado de Esperanto kaj por lerniloj.

La 5-an de aŭgusto venis la malfeliĉiga novaĵo pri la forpaso de nia kolego, Paul Gubbins.

fonto:

<http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=31>

Omaĝe al Paul Gubbins

"Paul Gubbins"

En dormo li mortis,
surprize kaj pace,
eble sonĝante pri neverkitaj verkoj.

Amiko de plej multaj,
ĉiam ronde sprita, humurplena,
kun afabla rideto tutvizaĝe.

Mi memoros lin kiel lastfoje, kun supla sunĉapelo
laŭreklame faldebla poŝen
kaj elfekebla sendifekta se elefanto ĝin digestis.



verkis
Jorge Camacho Cordón
(Madrido, 8.8.2016)

Poemoj de Evgenij Georgiev - Espopore (Kazaĥio)


Afriko

Min firme allogas
Bunteco de Afrik',
Mi ridas kaj ploras
Pro ŝrikoj de l' muzik'.
Mi iras, mi miras
Pro ludo de lirik'.
Admiron akiras
Rikolt' de l' retorik'.

La karnon ekhavi
Facilas por la vort',
Kaj akre kartavi
Proksime al la mort'.
Mi scias mistonon
De dorna fuŝakord',
Misteron betonan
Ĉe dorma norda pord'.

La pikoj de l' frosto
Rabias en instru'.
Min rabas la rostro
De frida fakta pruv'.
Pro tio valoras
Ĉi-kanta varma bru'.
La mondo bonvolas
Ordigi per detru'...

Espopore



Limerikoj

Programisto el Timiŝoar'
Devos pagi precize dum jar'.
Multoblege damnita
Estu tiu kredito.
Li ne manĝos ja ĝis januar'!

Mongolo, kazaĥa najbaro,
Sin revis trabani en maro.
Sufere en serĉo,
Direkte al Kerĉo,
Li stiras ĉevalon je ĉaro.

Novjorka folulo senkapa
Kun kalvo farita el drapo,
Pro l' granda neglekto
Al la intelekto
Po centoj kolektas da frapoj.

Oldskol-biciklisto frenezas –
Al ĉiuj reguloj obeas.
Trafiko furiozas!
Sed l' ulo seriozas:
Per sia hupego li beas.

Emerito el urbo Panamo
Forbruligis edzinon per flamo.
Oni krias: "Faŝist'!"
"Ne, mi estas fiŝist'...
Ajnokaze, ne sentis mi l' amon."

Espopore

Poemoj de Konuralp

Ölüm mukadder
Öyleyse neden bu keder
ve bu debdebeli törenler?
Eskiden kalma bir huyu
İnsanoğlunun ve insankızının bu
Ölmeye doğduğunu inkar eder
Zamanın rüzgarında birer birer
İskambilden kaleler inşa eder
Ölüm bir anımsatma
Geçiciliğin üfürüğünden bir damga
Ama sakın yan gelip yatma!
Herşey boş derler, kanma
Ezeli ve ebedi bir oyun
Ha figüran ha başrolde
Senden de kalır bir damga...



Morto estas neevitebla.
Do, kial tiom da malgajeco
kaj tiom da pompaj ceremonioj?
Malnova kutimo
de la homaj gefiloj estas la
niedo de naskiĝo por morto.
En la vento de la tempo
ili konstruas kastelojn per ludkartoj.
Morto estas rememorigilo,
stampo de la portempeca ekbloveto.
Sed neniel kuŝu kaj dormu!
Ĉio estas vana diras oni, ne trompiĝu.
Ĉiama kaj eterna ludo.
Aŭ kromrolulo, aŭ ĉefrolulo
ankaŭ restos stampo de vi...

KONURALP

KONURALP



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde

bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni bileşik kelimeleri ayırıyoruz.

LA NOMOJ DE LA TAGOJ

La tri mus-id-oj¹ iras al la lern-ej-o².

Tie ili lernas aritmetikon, geografion, gramatikon, kaj aliajn aferojn.

Ili ankaŭ lernas legi kaj skribi. Ili legas en libroj; ili skribas per kraĵonoj kaj per plumoj sur papero.

Ili ankaŭ lernas danci kaj kanti.

Roĝero kaj Ŝila lernas rapide, sed Johano lernas malrapide. Li ne estas diligenta.

La instru-ist-ino estas mal-juna griza muso. Ŝia nomo estas Fraŭlino Saĝa. Ŝi instru-as la infanojn.

Iun tagon, Fraŭlino Saĝa diris: "Hodiaŭ vi devas lerni la nomojn de la tagoj. Estas sep tagoj."

Ŝi skribis sur la nigran tabulon, per kredo: dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato.

La tri mus-id-oj kopi-is tion en la kajerojn, per kraĵonoj.

"Mi preferas dimanĉon," diris Johano.

"Kial vi preferas dimanĉon?" demandis la instru-ist-ino.

"Ĉar ne estas lecionoj je dimanĉo," respondis la knabeto.

"Ho Johano," diris la instru-ist-ino, "vi ne estas diligenta."

¹ "id-o" signifas "la infanon de..."

² "ej-o" signifas "la lokon, kie..."

Yeni kelimeler

afero	şey
aritmetiko	aritmetik
devas	-meli, -malı (devi: fiilin mastar formu) Türkçede ek olan bu anlam esperantoda bir kelimedir
diligenta	çalışkan
dimanĉo	Pazar
geografio	coğrafya
gramatiko	dilbilgisi
hodiaŭ	bugün
jaudo	Perşembe
je	genel anlamlı bir edattır, diğer edatların yetersiz kaldığı durumda bu edat kullanılır (-de, -da, -e, -a gibi anlamları vardır)

kopiis	kopyaladı (kopii: fiilin mastar formu)
kreto	tebeşir
lundo	Pazartesi
mardo	Salı
merkredo	Çarşamba
musido	fare yavrusu
nomo	isim
papero	kağıt
preferas	tercih ediyor (preferi: fiilin mastar formu)
sabato	Cumartesi
vendredo	Cuma

Yeni ekler

-id	Kelimeye o şeyin yavrusu anlamını verir (kato, katido = kedi, kedi yavrusu gibi)
-ej	Kelimeye yer anlamını verir (lerni, lernejo = öğrenmek, öğrenme yeri, okul gibi)

Dilbilgisi

devas Türkçede bir ek olarak kullanılan bu zorunluluk ifade eden kelime (-meli, -malı) Esperanto'da başlı başına bir kelime olarak kullanılır. Hemen tüm latin dillerinde de bu böyledir. Örn. İngilizce'deki "must" kelimesi. Genelde de çift fiil olarak kullanılır. Örn. Mi devas iri al la lernejo (okula git-meliyim)

je Esperanto'da yer, iyelik, yön vs gibi anlamlar veren edatlar bolca bulunur ancak bazen bu edatlardan hiç birisi istenilen anlamı veremeyebilir. Bu durumda genel anlamlı bir edat olan "je" sözcüğü kullanılır. Genelde buna yakın bir edat vardır ve o edat tam anlamı vermese de kullandığımızda karşıdaki kişi bizi anlar. Verilebilecek bir örnek: "je la oka horo" (saat sekizde), saati ifade etmek için tam bir edat bulunmaz, biz Türkçe'de "de" ekini kulansak da, Esperanto'da bunun anlamı yer, yön gibi anlamlar verir. Onun için bu özel edatı kullanırız.

La 102-a UK en Seulo (julio 22a-29a 2017)

La ĉefurbo de Korea Respubliko, Seulo, gastigos la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 2017. La Estraro de UEA devis diskuti nekutime longe antaŭ ol fari la elekton inter Seulo kaj la kanada Montrealo, ĉar la invitoj de ambaŭ urboj estis zorge preparitaj kaj detale dokumentitaj. Ambaŭ lokoj...

Legu pli ĉe: <https://2017uk.wordpress.com>



Karavano al Seulo por la 102-a UK

Laŭ anticipa plano la Karavano itineros laŭ fama Trasiberia fervojo (9298 km), la plej longa fervoja itinero en la mondo. Karavano startos en Sankt-Peterburgo, trapasos nordon de eŭropa parto de Rusio, Uralon, Siberion, vastan azian parton de Rusio preter urboj Vologda, Kirov, Perm, Jekaterinburg, Tjumen', Omsk, Novosibirsk, Krasnojarsk, Irkutsk, Ulan-Ude, Ĉita, Blagoveŝĉensk, Ĥabarovsk al Vladivostoko sur la Pacifika marbordo. El Vladivostoko ni veturos al Koreio per pramo aŭ per aviadilo.

Legu pli ĉe: <http://vojagxo.info/karavano-al-seulo/>



Kapaniŝ



Bu sayımızda da sizlere okuyacak bol bol materyal sunmaya çalıştık :

- Ekinde sözlük olan üç metin,
- Dilbilgisi notları,
- Genç dedektifler macerasından 4.

başlık,

- Fikralar, bulmece, ve yemek tarifleri.
- Felsefe tarihinde sıradaki filozof Boethius,
- Lao Tse'nin kitabından bsıradaki başlıkları,
- 101. UK'dan haberler,
- Esperanto günü,
- Kaybettigimiz önemli bir kişilik Paul Gubbins,
- Şiir köşemiz,


- Esperanto kursumuzun sıradaki başlığı,
- ve kısa kısa muhtelif Esperanto haberleri.
- ve daha başka bir çok şey.

101. UK hakkındaki anlatıyı da açılış yazımızda verdiğimiz link'ten, milliyet blogun'daki yazımızdan okumayı atlamayın lütfen.

Unutmayın eski sayılar burada:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuetto/>

Sonraki sayımızda buluşmak üzere, hoşçakalın...



ELSUTU KAJ LEGU SENPAGE

Tradukaĵojn de Ĝan Ŭesli el Usono.

<http://esperanto.us/>



Solvo de la kurĉvort-enigmo

O	L	O	K		N			O		O		10	
V		T		O	I	K	V	V	O	L	S	9	
O		O				O	R	V		I		8	
	O	P	O	U	D		P		O		I	7	
			T					O	M	O	D	6	
		A	R	A	K		I	G	A	M	O	5	
	O	L	O	R				O	L	O	P	4	
E			A	T	E			O	L	K	N	O	3
	O			I					E		L	2	
		I	D	N	O	P	S	E	R	O	K	1	
12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1		

MALFERMA ALVOKO DE TEJO

TEJO bezonas dungitajn almenaŭ 5 fakulojn, kiuj laboru po kvar monatoj: de la 1-a de septembro 2016 ĝis la 31-a de decembro

2016. Ĉu vi interesiĝas? La limdato por kandidatiĝi estas ĝis la 22-a de aŭgusto. Rigardu pliajn informojn ĉe:

<http://tejo.org/2016/08/malferma- Alvoko-igu-oficisto-de-tejo/>

